

2^a JARO.

OCEANO

N^o 10^a


TRA LA MONDO.

·TUTMONDA·ILUSTRATA·REVUO·ESPERANTISTA·

APRILIO

1907.

GENERALA PLANO KAJ ENHAVO.



ĈIULANDA VIVADO : Internacia enketo pri edukado. — Raporto de Pro *Th. Rousseau* laŭ dokumentoj de F^{ino} *Schenk* (SVISUJO) kaj *E. L. Robinson* (U. Ŝ. de A.).

SCIENCJOJ : Marcellin Berthelot, de *Marcel Finot*. — La estonto de la Scienco, de *Marcellin Berthelot* (FRANCUJO).

ĈIULANDAJ KUTIMOJ : La bulgara edziĝo, de *Ksenofono Ĵankov* kaj *Leŭtenanto Silvestriev*, kun ilustraĵoj de Pro *Georgiev* (BULGARUJO).

PRI ESPERANTO : Ĉirkaŭ la Kembridĝ'a kongreso, de *La Trio por la Trio* (ANGLUJO). Kroniko kaj Bibliografio.

SPORTOJ : Boat-kurado en Cambridge, de *Pastro J. C. Rust*. Sporta Kroniko. — L'U. S. F. S. A. de *L. de Guesnet*. La suprenjetado, de *A. P. Beauchemin* (KANADO).

MILITISTARO KAJ MARISTARO : Pri l' eksplodo de l' Iéna, de *Leŭtenanto Fahrner*. — Milita ekzekuto en Blida, de *Max Rebière* kaj *L. Rigoir* (FRANCUJO).

GEJUNULAJ PAĜOJ : Aprila fabelo, de Pro *Bord*. — La unua tago de mia dek oka jaro, Monologo por junulinoj, de *Roksano*.

VIRINA PAĜO : La Modo, de *Roksano*.

TRA LA MONDO : La Runoj kaj runaj rakontoj, de *John Lundgren* (SVEDUJO).

MIKSAĴOJ : Ludoj, konkursoj, de *Ch. Brunet* (FRANCUJO).



CAROLINE
OXENFORD, EV.
1907.



UNU NUMERO : 75 CENTIMOJ.

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj, devas esti sendataj al S^o Brunet, 9, Cours V. Hugo, Bordeaux, (Fr.)
Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO devas esti sendataj al:

Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Jara abono : 8 fr. ĉiulande. (1^a Jaro : 12 fr.) — Duona : 4.50 fr. — Kvarona : 2.25 fr. — Unu kajero : 75 c.

RIPREZENTANTOJ : Brita Imperio : British Esperanto Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London, W. C.

Svedujo : S^{ro} P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

« TRA LA MONDO » estas aĉetebila ponumere ĉe la Librairie de l'Esperanto, kaj EN ĈIUJ FRANCAJ STACIDOMOJ.

POŝTAJ ABONOJ

en la jenaj landoj: *Belga, Dana, Franca, Itala, Norvega, Portugala, Sveda, Svisa.*



Esperanto, Internacia Praktikilo.

La komerca vidpunkto.

Jen kelkaj leteroj ricevitaj pri tiu temo :

De nia fervora samideano, G. D. Buchanan :

« Kun granda plezuro mi legis vian trafantan ĉefartikolon en « T. l. M. » pri la petoj — mi preskaŭ dirus « postuloj » — kiujn oni altrudas al ni « POR LA PROPAGANDO ! » Mi ĝojas, ke vi kuraĝas kontraŭstariĝi al tio ĉi kaj gratulas vin je la nomo de la « pagantaj » komercistoj, kiujne deziras peti reklamon, kvazaŭ ili estus almozuloj, « POR LA PROPAGANDO ».

De nia sindona kunlaborantino, F^{ino} C. Oxenford :

ESTIMATA REDAKTORO,

Kun multe da intereso mi legis vian Redaktoran Babiladon pri la Komercistoj Esperantistaj, kaj la devo de la Esperantistoj.

Vi enmetis en vian babiladon, kelkajn eltiritajn dirojn el diversaj aŭtoroj. Mi povus pleniĝi tiun ĉi leteron per simplaj proverboj, kiuj povus rilatiĝi al la Esp. komerco.

Unu el niaj anglaj proverboj diras « Eksteruloj plej bone vidas la ludon ».

Kiel « Eksterulino », permesu al mi skribi iom pri tiu ĉi ludo de komerco. Mi konfesas ke la komerca flanko de Esperanto neniel interesas min, sed, leginte en T. la M. ke komercistoj plendas ke, foje, ili ne profitas per Esperanto, mi pensis ke mi penus eltrovi la kialon de tio. Antaŭ la lasta Kristnasko, mi organizis publikan kunvenon kaj ekspozicieron de poŝtkartoj, k. c. Mi pensis « kial mi ne penus fari ekspozicieron de komercaĵoj ankaŭ ? » Multaj Esp. komercistoj anoncas siajn vendeblaĵojn kaj multaj aliaj enmetas siajn adresojn en la Jarlibron. Nu, mi sendis sciigojn pri mia projektita afereto al 25 firmoj, petante malgrandan specimenojn de iliaj diversaj artikoloj. El la 25, 10 respondis; el la 10, nur 5 aŭ 6 estis praktikaj respondoj, kaj el la 5, nur unu estis tute praktika kaj praktikebla. Tiu sendis kelkajn specimenojn por vendi je unu penco, kaj tiuj estis la solaĵoj, kiuj estis vendataj dum la vespero, esceptinte lernolibrojn k. c. Ĉu tiuj faktoj ne parolas per si mem? Per tiu sperto, mi ekkomprenis kial la Esperantaj komercistoj ne sukcesas.

Nun ni rigardu la demandon je la vidpunkto de la aĉetanto.

Ĝis nun, la plimulto el la Esperantistaro apartenas al la meza klaso de la socio. Ni havas nur iom da mono, kiun ni povas malŝpari por Esperanto, kaj ni ĝenerale baldaŭ trovas, kiam ni komencas labori por la « Afero », ke, kun kotizaĵoj al grupoj, abonoj al ĵurnaloj, kosto de libroj, poŝtelspezoj k. t. p. tro rapide forkuras tiu sumo, kiun ni povas doni por la ' kara lingvo '. Konsekvence kiam ni vidas anoncon pri nova komercaĵo, kvankam ni volonte aĉetus, ni ne povas. Plie, por havi specimenojn, ni devas pagi — ekstere la prezon por la komercaĵo — la poŝtkoston por la mendletero, kun tri aŭ kvar pli da pencoj por la poŝtmandato, se ni devas sendi al eksterlando.

Krom tio, la specimenoj ne estas malgrandaj, aŭ malkaraj sed ofte grandaj skatoloj k. c., kaj tiu estas kuraĝa homo, kiu aĉetos ion pri kio ĝi konas nenion.

Rilate al Anglujo, la komercistoj fremdaj devas memori, antaŭ ĉio, ke dank'al « Libera Komerco » (Free Trade), ni povas aĉeti ion kaj ĉion ofte pli malkare ol ili povas aĉeti en sia propra lando, kaj se ia artikolo ne estas pli bona ol tiuj, kiujn ni jam havas je pli malalta prezo, ni ne zorgas aĉeti ĝin, malgraŭ nia sindoneco por Esperanto.

Persone, mi trovis ĉiuspecajn komercaĵojn, kiujn mi povis pruvi, tre bonaj, sed ne sufiĉe pli bonaj por pravigi la eksteran elspezon por havigi ilin al mi, kaj mi pensas ke multaj aliaj same pensas.

Se la Esperantistaj komercistoj kaj firmoj povus kunigi sin kiel kompanio (sindikato?), kaj malfermus malgrandan butikon en la ĉefa urbo de ĉiu lando, kie ĉiuspeco de Esp. komercaĵoj povus esti aĉetata en malgranda kvanto por pruvo, ili mem — se la vendotaĵoj estus sufiĉe bonaj — baldaŭ « kreus la peton ».

Komercistoj diros al mi ke mi ne pensas pri la treega elspezo bezonota unue por tio ĉi, sed mi respondas per alia angla proverbo. « Oni devas enĵeti sardelon por ekkapti makrelon ». Mi certe ne pensas ke Esp. Kom'oj sukcesos ĝis la tuta afero estos metita sur pli ordan — pli... unuigitan fundamenton; kaj se ili akceptos proponeton de « Eksterulino », mi konsilas ke ili pretigu malgrandajn malkaregajn specimenojn de siaj komercaĵoj por la tria kongresa ekpozicio.

Nun mi finas, atendante ricevi de la tuta komerca esperantista mondo, ventegon da riproĉoj, eĥoante nian — ankoraŭ alian — anglan proverbon « Ĉu mi provas instrui al mia avino suĉi ovojn ? »

Vere via,

C. OXFENFORD. E. V.

Diversaĵoj.

« Bonvolu sendi al mi ses ekzemplerojn de « Tra la Mondo » dum kvaronjaro. Mi havas malgrandan klason, kiu volas uzi « Tra la Mondo » por la lernado de Esperanto. Ni esperas ke la gazeto bonege taŭgos por tiu celo ».

El letero de Rev. Herbert H. Gowen, el Seattle.

Ni esperas ke la grupo de Seattle havos por laŭdi sin pro tiu provo, kiel la aliaj grupoj uzantaj « Tra la Mondo » dum la kursoj, por la instruado per bildoj.

Post Belgaj, Bohemaj, Francaj, Svisaj, grupoj, la Brazila esperantista klubo elektis « Tra la Mondo » kiel premion por konkurso de Esperanto. Koran dankon al niaj amikoj por tiu estimpruvo.

La fervora grupo en Beaune organizis grandan teatran feston la 14^{an} de Aprilo.

La gasta kunveno finiĝis per loterio, kies ĉefa premio estis bela « Poŝhorloĝo Espero ». Sciigante nin pri la bona alveno de la poŝhorloĝo, S^{ro} Bord skribis al ni tiun mallongan, sed esprimman, frazon : « Mi ricevis la poŝhorloĝon ; mirinde ! »

Ni ĝojas pri tiu nova sukceso de bonega kaj utila propagandilo.



Premio al niaj legantoj.

Por esti agrablaj por niaj legantoj kaj samideanoj, ni klopodadis kaj faris interkonsenton ebligantan liverigi, *hejmen* kaj sen transportkosto en ĉiun Eŭropan landon krom Rusujo (Transmare kaj Rusuje, eksteren transporto kaj limdepago plue), je la malgranda prezo montrata ĉi sube, la precizegan poŝhorlogon L'ESPERO, kiu eliras el unu el la plej bonaj svisaj fabrikejoj, kaj kies ujo, el blanka metalo oksidita kvazaŭ malnova arĝento, estas fotografe montrata ĉi apude.

En la du kvalitatoj, la poŝhorlogo estas plene garantiata, bonege reguligita, radaro je ankre perfektigita, eleganta formo. La sendo estas farata kontraŭ poŝta repago aŭ antaŭa pago, laŭ peto sendita al la administracio de «Tra la Mondo».

Unua kvalitato: 30 fr. Dua kvalitato: 20 fr.

Por Rusujo, aldoni 5 fr. por la transporto kaj limdepago.

Por U. Ŝ. de A., aldoni 10 fr. por la limdepago. Antaŭa pago estas *necega*.

INTERNACIAJ ENKETOJ.

Enketo pri Enketo. — Konkurso.

Sufiĉas legi la raporton pri nia enketo pri edukado por kompreni la intereson de tiaj esploroj, tiel faciligitaj de Esperanto.

Kvankam la temo estis altrudita de ni, multaj personoj sendis sian partoprenon. Ni volas fari pli bone ankoraŭ por nia estonta enketo, kaj petas vin, karajn gelegantojn, konigi mem vian deziron, diri al kio direktiĝas via sciemo.

Posedante la rezultaton de tiu prepara enketo, ni elektos por la definitiva-la temon plej proponitan.

Oni bonvolu respondi la jenajn demandojn:

1^e Kiun temon vi proponas por la enketo.

2^e Proponu detalan demandaron.

3^e Kiom da personoj, laŭ vi proponos la saman temon.

Ni dediĉas al tiu konkurso premiojn, pri kiuj ni parolos en nia estonta numero.

Blazonŝildeto esperantista.

La ideo pri konsulejoj kaj oficejoj esperantistaj pli kaj pli disvastiĝas. Jam kelkaj personoj demandis al ni ĉu ekzistas blazonŝildeto por konsulejoj. Nenio estas jam decidita. Ĉar la afero interesas konsulojn ĉiulandajn, ni decidiĝis enpresii projektajn proponitaĵojn de nia samideano A. Baissac, el Constantine, (Konstantin) Algerujo. Ili estas elpensitaj laŭ naciaj ŝildetoj, kio estis facila por S^o Baissac, ĉar en lia urbo loĝas konsuloj de ĉiuj landoj. Ni akceptos voĉdonojn kaj proponojn ĉu pri la formo, ĉu pri la surskribo aldonota.

Oni povos ĉu elekti unu el la proponitaj modeloj, ĉu sendi alian.

Ni akceptos respondojn ĝis la 1^a de Julio.

Enketo de « Esperanto »-Journal.

Nia bonega kunfrato « Esperanto »-Journal malfermis enketon pri la kosto de la vivo en ĉiuj landoj.

Jen alloga kaj atentinda temo. Jam alvenis multaj interesaj respondoj kaj aliaj estas ricevotaj de Indio, Japanujo, Nordkaj Sud-Ameriko.

La publikigado de la respondoj, kiu komencos dum la Maja monato, promesas do esti pleje interesa. Ni rememorigas ke « Esperanto » estas preskaŭ ĉie aĉetebla. Oni devas ĝin postuli ĉe ĉiuj jurnalvendistoj.

Al niaj kunlaborantoj.

Ni ekscias, kun malagraba surprizo, ke verketo enpresita de ni, antaŭ longe, kiel originalo en Esperanto, estas, reale, traduko laŭ franca aŭtoro. Estas al ni neeble koni la tutmondan literaturon. Ni do devas konfidi al niaj kunlaborantoj. Ĉi tiuj bonvolu ĉiam citi la devenon de l'Esperantaj tekstoj senditaj. Alimaniere farante, ili povos kaŭzi al ni gravajn enuojn.

LA REDAKTORO.

CHARLES MENDEL, ÉDITEUR
118, Rue d'Assas, PARIS.

NOVA REVUO DE FOTOGRAFADO

Foto-Revuo Internacia

ĈEFREDAKTORO: CH. VERAX.

— Teksto franca kaj Esperanta. —

La Foto Revuo Internacia n'est pas la traduction en Esperanto de la Photo-Revue; c'est une revue indépendante dont les articles sont originaux ou puisés dans les meilleures revues du monde entier.

ABONO: Jare: 5 fr. por ĉiuj landoj.

ILUSTRITAJ POŝKARTOJ PROPAGANDAJ.

kun belaj vidaĵoj eltiritaj de

« TRA LA MONDO »

La serio (6 kartoj), afr.: 0 fr. 40 c.

5 serioj (30 k.), afr.: 1 fr. 50 c.

10 serioj (60 k.), afr.: 2 fr. 50 c.

15 serioj (90 k.), afr.: 3 fr. 75 c.

Rekomendo: 0 f. 10 c. aŭ 0 f. 25 c. plue.

Pageblaj poŝtmarke aŭ monpapere.

ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genève 1906

Prezo: FRANCUJE. — 11 f50 la kesto da 2 boteloj Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ALILANDE. — 4f ĉiu botelo prenita en St Etienne, impostoj kaj transporto pluaj.

Ĝenerala Tenejo por Francujo kaj Fremdujo:

J. B. Brunon-Chauvet
St Etienne (France).



LA INTERNACIA TRINKAĴO!

Viskio Esperanto

Registered trade mark N^o 270,042. Marque déposée N^o 13,195. Registered Label N^o 272,434.

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la aŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & C^o

GARTHLAND STREET,
GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto - Glasgou.

Ĉampanvino "Mirinda"

1 fr. 75 kaj 3 fr. 50 ĉiu botelo
por 12 boteloj, minimume, enpakitaj en koston.

Ĉe S^{ro} Ch. JADEAU, MERCUREY (S. & L.) France

SE

vi konas malfacile spiranton (astmemulon), vi faros al li servon konigante la « Remède d'Abyssinie Exibard » (Abisinia kuracilo EKSIBAR), pudre, cigarede, aŭ je formo de folioj por fumi kvazaŭ tabakon en la pipo. Tiu kuracilo, ordonata de ĉiuj kuracistoj, sensuferigas kaj resanigas milojn da malsanuloj ĉiujare. Sin turni al

Sinjoroj H. Ferré, Blottière et C^{ie},
102, rue de Richelieu, PARIS.

L'Internacia Signo

estas la « VERDA STELO » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (per kunmona mendo). Ĉe S^{ro} Emilo Gasse, 105, rue du Lycée, Le Havre (France).

MILKA
VELMA
NOISETTINE

Suchard

LA BONGUSTEGAJ

ĈOKOLADOJ

POR MANMANĜI.

BIBLIOGRAFIO (Sekvo).

Originalaj verkoj:

Pri Esperanto per Esperanto, bonega ilustrita raporto pri la kongresoj en Boulogne kaj Genève, kaj pri la esperantista movado, de nia agema amiko P. Ahlberg, redaktoro de l' bonega gazeto « Esperantisten ». Multaj ilustraĵoj, memoraĵoj de ambaŭ kongresoj, aldonas al la intereso de la raporto, elirita el la gazeto « Affärsvärlden » *Provo de Esperanta nomigado de personaj nomoj*, de esp. n^o 10,072 (0,75 pesetoj ĉe Pubul y Morales, Avellanas 7, Valencia, Hispanujo).

La Vocabulaire Français-Esperanto des termes photographiques, de Ch. Verax (Ch. Mendel, eldonisto, Paris 0 f. 75) enhavas radikojn ne nur fotografajn, sed ankaŭ fizikajn, ĥemiajn, kaj meĥanikajn rilatajn al la fotografo. Tiuj vortoj cetere ne estas novaj: preskaŭ ĉiujn ni jam vidis en nomaro de S. I. R., kaj multajn en la ĵus aperinta dua eldono de Esp. Germ. Vortaro. Jen kelkaj aliaj: *sortimento* (assortiment), *kirli* (battre en neige), *centezimala* (centésimal), *fasko* (faisceau), k. t. p. Sed kial nune uzi *perpendikla* anstataŭ *perpendikulara* (A perpendikular, F perpendiculaire, G perpendicularé)?

Ĝi enhavas ankaŭ klarigojn pri afiksoj de nomaro Ĥemia, kaj pri jam de longe proponita sufikso *izi* (meti en stato de, ŝmiri je), neanstataŭebla de *izi* (elektr-izi, magnet-izi).

S^{ro} Mendel zorgo kaj kompetente eldonis tiun libreton, kiel cetere la bonegan gazeton *Foto Revuo*. M. F.

Muziko:

Le Petit tambour de l'An II, muziko kaj francaj paroloj de nia sindona kunlaboranto E. Bacquet (25 c. ĉe S^{ro} Rosoor-Delattre à Tourcoing, Nord, Francujo).

La Ventoj, ĉarma muziko de A.-J. Witteryck, laŭ poeziaj paroloj de G. Gezelle, esperantigitaj de D^{ro} M. Seynaeve. Nia amiko, eldonisto de « Belga Sonorilo » kaj de « Tra la Mondo » permesas kantigi libere ĉi tiun kanton ĉe la grupoj abonintoj de ambaŭ gazetoj. Ni konsilas la uzon de tiu afabla permeso. (1 fr. ĉe Presejo Witteryck, Bruges, Belgujo).

Por la propagando kaj la lernado:

« *A First Reader* » legolibro por la anglaj lernokomencantoj, de F^{ino} E.-A. Lawrence. Ĝi estas bonega elekto el bonaj tekstoj celantaj faciligi al la angla-lingvanoj la lernadon de Esperanto. Kelkaj estas akompanataj de gramatikaj klarigoj kaj de la angla teksto. Ni havis la plezuron trovi en ĝi reprenon de la tiel ĉarma rakonto « Kristnasko en Svedujo » de F^{ino} H. C...d, aperinta en « Tra la Mondo ».

Tre certe tiu libro zorgo elpensita, bonege eldonita, kaj malkara estos tre utila al niaj anglalingvaj amikoj, kaj ĝi estos nova sukceso por nia tiel sindona, agema kaj ĉarma samideano F^{ino} Lawrence. (64 paĝoj, 60 centimoj ĉe Stead's Publishing House, 39, Whitefriars str., London. 70 c. ĉe T. I. M.)

Die internationale Hilfssprache und das Esperanto, tre atentinda broŝuro de nia fama samideano, Wilhelm Ostwald, kies apogo por Esperanto iom post iom venkas la indiferentecon de scienculoj kaj gazetoj en Germanujo (20 Pf. ĉe la eldono de « GERMANA ESPERANTISTO »).

Eine Weltsprache oder drei, respondo de Prof. Louis Couturat, el Paris, al Pr Diels (Germano).

Le Congrès esperantiste de Genève, de S^{ro} E. Boirac (Eltraĵo el LA REVUE PÉDAGOGIQUE, 40 c.)

Où en sommes-nous? Bonega propagandilo, de nia kunlaboranto G. Chavet (0,50 ĉe la LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO).

Franca gramatiko por esperantistoj, de Paul Boulet. Utila libro celanta amikigon de Esperanto kaj de la propagandistoj de la franca lingvo. Kun antaŭparolo de S^{ro} E. Boirac. (1 fr 50 ĉe la aŭtoro, 80 Bd du Prince-Albert, Boulogne-s-mer).

Esperanto, en Islanda lingvo, de nia kunlaboranto, Th. Th. Tre konsilinda por la propagando. *Corrigé de l'exercice* de la lingvo internacia Esperanto de L. — L. Zamenhof, par L. de Beaufront. (Ĉe Hachette & Cie, Paris).

Fonetika Skribado por enpresigoj en ne-esperantistaj gazetoj de D^{ro} F. Javal.

« *Rutena lernolibro de la lingvo Esperanto* », verkita de S^{ro} Miĥaelo Jurkov. Tre zorgo eldonita de nia samideano, Alfred Brugger, libraro en Tarnopol (Galicio-Aŭstrio) kaj interesa por la lingvistoj. Rekomendinda al la grupaj bibliotekoj kiel propagandilo (70 il., ĉe la eldonisto).

« *Stenografio Duploye* ». — Ni ricevis interesan folieton pri la stenografio laŭ la tre konata sistemo Duployé. La principo de tiu sistemo estas tre simpla kaj alloga kaj ni rekomendas ĝin al tiuj kiuj deziras lerni la stenografiarton tiel utilan, eĉ necesegan je nia epoko.

Senpaga propaganda folieto estas ricevebla de S^{ro} L. F. Canet, Direktoro de la bonega revuo stenografia: *La Plume Stenographique de France*, fervora partiano de la « méthode Duployé » kaj ankaŭ de Esperanto.

« *Grand Dictionnaire Français-Esperanto* ». Ni ricevis la 3^{an} kaj 4^{an} kajerojn de tiu verko, kiu dank' al la reorganizado de *Presa Esperantista Societo*, aperos nun regule po 8-12, kaj eble pli multe, kajeroj ĉiujare. (Plena kosto 17 Fr., pageblaj one. Post la 1^a de Oktobro, la kosto de la vortarego estos 30 frankoj anstataŭ 17).

La restoracio Bélisaire (Bordeaux, Francujo) enpresis noticeton pri Esperanto en ŝipharo Bona ideo ŝuldata al la tiea grupo. La aliaj ĝin imitu.

FERVOJOJ DE PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE

INTERNACIAJ VOJAĜOJ JE LAŬVOLAJ VOJAROJ.

Ĉiuj stacidomoj de l' grandaj francaj relretoj kaj iuj vojaĝaj agentoj liveras, dum la tuta jaro, libretojn por internaciaj vojaĝoj je vojaroj kombinitaj laŭ la deziro de l' vojaĝantoj, kaj povantaj enhavi kune kun traĵojn:

a) Sur la ferlinioj de l' grandaj francaj relretoj, de l' relretoj algeriaj kaj tunisiaj, kaj de l' relreto de Corse (elp. Kors');
b) Sur iuj marlinioj;

c) Sur la Eŭropaj fervojoj, esceptinte la fervojojn anglajn, hispanajn, portugalajn kaj rusajn. La vojaroj de la vojaĝoj komencotaj en Francujo, Alĝerio, Tuniso, Corse, Italujo, devas enhavi nepre traĵojn fremdlande. Ĉiokaze, ĝi devas realigigi la vojaĝanton al ĝia deirpunkto. Minimuma traĵo taksata: 600 kil. Rajtdaŭro: 60 tagojn ĝis 3000 km., 90 tagojn de 3000 ĝis 5000 kaj 120 tagojn preter 5000 kilometroj.

La libretoj ebligas la vojaĝanton halti ĉe ĉiu stacidomo situaciita sur la vojo.

La petoj pri internaciaj libretoj estas plenumitaj samtage en la stacidomoj de Paris kaj Nice (Nis) kaj en la Vojaĝaj Agentejoj, kiam ili alvenas antaŭtagmeze. En ĉiuj aliaj stacidomoj, estas necese prezenti la petojn almenaŭ 4 tagojn antaŭe. Se la libreto estas mendita de Alĝerio, Tuniso, Corse, estas necese aldoni ankoraŭ la templimon por venigi ĝin de Francujo, kie ili estas verkataj.



Kopirajto.

SUPERA LERNEJO EN U. Ŝ. DE A.

Internacia enketo pri Edukado (*)

15 Landoj partoprenintaj.

La Festo de l' Arbaro en Lausanne (Svisujo). — Supera lernejo en Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko.

En Lausanne mi alvenis ĝustatempe por ĉeesti la Feston de l'Arbaro. Tiu festo ŝajnis al mi ne nur festo de la lernantoj sed, vere, festo de la juneco.

Tie ĉi suprenkuras al karuselo geknaboj kiuj certe apenaŭ povas legi. Tie dancadas la plej grandaj gestudentoj de la duagrada lernejoj kaj de la Universitato. Al la publiko oni zorge malpermesas eniri la lokon difinitan por la junuloj; eĉ la gepatroj restas ekstere observante kontente, super malalta palisaro, la amuzojn kaj la ĝojon de siaj geinfanoj. Ĉe l' vesperiĝo ĉiuj amasiĝas. Antaŭe, kelkaj knaboj, unuforme blanke vestitaj, kiuj ludas tamburojn, kaj la muzikistaroj kiuj dancigis en la balo. Malantaŭe, la tuta anaro sekvas, la gejunuloj, la parencoj, brako ĉe brako, de la plej junaj infanoj ĝis la

plej maljunaj avoj. Alvenante en la urbon, bengalaj fajroj arte lumigas la Universitatejon kaj la tutan placon antaŭe, kie miloj da personoj premas

unu la alian; kaj jen studento organizas grandan rondedanco. Ili estas pli ol ducent, kiuj, mano en mano, ekturnas kantante. Kiam la danco estas finita, la procesio daŭrigas sian marŝadon, alvenas novan placon, kie rekomencas la rondedancoj. Oni vere sentas, ke tiu popolamaso estas kvazaŭhejme, ke ĝi uzas siajn placojn, siajn stratojn, sian tutan urbon por siaj amuzoj, sammaniere kiel, hejme, oni uzas sian tutan domon. Kaj tion vidante, fremdulo ne povas ne envii en si mem, la feliĉon de ĉi tiu loĝantaro, kiu tiel simple, tiel senĝene kvankam konvene, montras sian ĝojon, en tiu festo kune popola kaj familia.



LA FESTO DE L' ARBARO. ANTAŬ LA UNIVERSITATEJO.

(*) Sekvo. Vidu la numerojn 8an kaj 9an.

Mi donas ĉi poste, plene, tre interesan raporton de S^{ro} E. L. Robinson, pri l' edukado en U. Ŝ. de A.

Edukado en la Unuigitaj Ŝtatoj.

Edukado, pri sia esenco, estas, mi supozas, simila en ĉiuj landoj. Sed estas tiom da diversaj kutimoj kaj tiom da diversaj aplikadoj de eĉ ĝenerala fakto, kiom estas da diversaj popolaroj. La cirkonstancoj diversigas en ĉiu lando rilate al komerca, hejma, politika kaj ankaŭ eduka vivo, kaj tial ni ĉiuj ellaboras vivproblemojn malsimile, celante tamen al la sama fino.

Mi estas verkinta tiun ĉi artikolon de kelke da semajnoj. Mi notis, tamen, en la Decembra numero de «Tra la Mondo» aron da demandoj, subskribitan «Steletto» kaj tial mi provos enkorpiĝi respondojn je ili en la priskribon de niaj lernejoj kaj eduksistemo jam preparitan.

Por bone kompreni nian sistemon estas necese ke la legantaro atentigu sin al la esprimo «popola edukado» kiun ni uzas priparolante pri nia instruameto. Laŭ tio, kio estas dirita supre, niaj kondiĉoj de vivo estas neordinaraj, kaj ankaŭ estis de la komenco tiaj ke ili necesigis liberan, ĝeneralan kaj malkaran edukon. Ĉiutage multe da Eŭropanoj, Azianoj kaj aliaj alvenas al niaj bordoj, kaj ĉar ili devas esti refarataj aŭ refandataj je Amerikanoj, estas necese ke ili estu amerikane instruataj, kiel eble plej baldaŭ, tiel ke ili, ĉe plej baldaŭa tempo, estu ensorbitaj en la politikan korpon. «Ne facila tasko» vi diros, kaj vere.

Por ke la geknaboj estu bonaj societanoj ili devas esti edukataj; kaj por ke ĉiu estu edukata, instruado estas ne nur senpaga sed ankaŭ deviga. Kelkaj urboj eĉ liveras senpage la studlibrojn.

En la unuaj jaroj de nia nacia vivo, nur mallarĝa rubando de lando, plej proksima al la orienta bordo, estis enloĝita; sed, kiel tempo pasis, la loĝantaro komencis sin puŝi okcidenten. Malgraŭ malfacilaĵoj, multe pli multaj ol oni povas, nuntempe, kompreni, la pioniroj konstruis lernejojn preskaŭ antaŭ ol ili posedis domojn. La unuaj edukejoj estis malgrandaj kaj malbelaj. La laboro de niaj antaŭuloj, kiuj eltranĉis enloĝeblajn lokojn en la virga arbaro, estis malfacilega, eĉ herculesa. Veturado estis preskaŭ nebla kaj rimedoj por transportado estis tre primitivaj, tial unue oni uzis tutajn arbotrunkojn por ĉiuj konstruaĵoj. Kiam la pioniroj laboris ĉu en arbaro ĉu sur kampo, ili ĉiam tenis paŭlon proksime, ĉar ili batalis ne nur kontraŭ sovaĝa lando, sed ankaŭ kontraŭ eĉ pli sovaĝaj Indianoj.

Kiam la loĝantaro densiĝis kaj vilaĝoj kaj urboj anstataŭis izolitajn grupojn da familioj, tiam la lernejoj pligrandiĝis kaj pliboniĝis.

Oni havis la ideon, unue, ke lernejo estas nur loko por studi librojn, kaj ke, por tio, iu loko estas tiel bona kiel alia. Feliĉe, tiu falsa ideo malrapide ekŝanĝiĝis ĝis nun, kiam pedagogistoj firme kredas,

ke nek infanoj nek plenkreskuloj povas bone labori ĉe loko kiu estas malpura kaj malluma. Nune lernejoj estas bonege konstruitaj kaj beligitaj, interne, per belartaĵoj — pentraĵoj kaj statuoj, kopioj de la eminentuloj — kaj per muzikiloj. Nia celo estas tiel beligi la edukejojn, ke la geknaboj tre deziru enesti en ili.

Mi intencas pritrakti nur la publikajn lernejojn ĉi tieajn. Tiuj estas dividitaj en du klasoj — la elementaj aŭ unuagrada kaj la altaj aŭ duagrada. Estas ok gradoj en la elementa lernejo kaj kvar en la alta. La ĝeinfanoj komencas je ĉirkaŭ la kvina jaro ĉe la «Kindergarten» — infanĝardenoj — kiuj estas formitaj laŭ la Froebel'aj principoj. De ĉi tie ili trapasas la ok gradojn de la elementa kaj la kvar gradojn de la alta lernejo, (ĉiu grado daŭras unu jaron) lasante la publikajn edukejojn je ĉirkaŭ la dekoka jaro. La lernantoj kunvenas de la 9^a horo kaj, esceptante unu horon por manĝi, de la 12^a h. ĝis la 1^a h., restas en la edukejo ĝis la kvara horo posttagmeze. Neniu el la lernejoj subtenataj de la Ŝtato, krom universitatoj kaj kolegioj, enhavas edukatojn kiuj loĝas en ĝi. Kontraŭe, ĉia urbo havas tiom da lernejoj ke studentoj povas loĝi hejme, elirante ĉiutage por esti priinstruataj.


Kiel mi diris supre, knaboj kaj knabinoj estas edukataj kune, ne nur en la sama konstruaĵo, sed ankaŭ en la samaj klasoj.

Pli granda atento estas donata, nune, pri la higienaj kondiĉoj de ambaŭ: lernejoj kaj lernantoj. La lumigado kaj ventolado estas perfektigitaj. La konstruaĵoj havas elektrajn lumigilojn por uzi kiam estas necese, kaj ofte grandegajn, vaporpelantajn ventolilojn por konduki freŝan aeron en la ĉambrojn kaj forpeli la malreŝan. En multe da urboj, ankaŭ estas ĉiutage ekzameno de la lernantoj por malkovri ian ajn malsanon komunikeblan, por ke la malsanulo estu izolata. Ekzamenoj estas farataj rilate al la vido kaj aŭdo de l' edukatoj je regulaj periodoj.

Krom tiuj ĉi ekzamenoj kaj la deviga instruado pri fiziologio, la Ŝtatoj dissendas al la instruistoj diversspecajn folietojn publikigatajn de la «Komisianoj pri Sano.» La celo de ĉi tiuj pamfletoj estas la edukado de l' popolamaso pri la leĝoj de

higieno kaj ankaŭ kiamaniere malhelpi la komenciĝon aŭ haltigi la disvastiĝon de komunikeblaj malsanoj. Speciala atento estas donata al fitizo aŭ, kiel ĝi estas nomata, «La Granda Blanka Pesto». La enhavo de la pamfletoj estas uzata por la instruado.

Antaŭe estis, kaj dirante veron ankoraŭ estas, sur la kamparo lernejoj por la geknaboj de l' terkulturistoj. Tiuj ĉi lernejoj estas apartigitaj je spaco de unu ĝis kvin mejloj. Necese ili estas malgrandaj kaj la salajroj de la instruistoj estas ankaŭ malgrandaj. Tial inklino ek-



MANLABOROJ DE LA LERNANTOJ.

montriĝis, ĉe diversaj lokoj de l' lando, anstataŭi kelke da tiuj ĉi ne sufiĉe grandaj lernejoj per unu granda, bone konstruota kaj aranĝota. La plano estas sukcesplena ĉiuloke kie ĝi estas uzita. Veturilego kolektas la geknabojn ĉiumatene, portas ilin al la lernejo kaj reportas ilin hejmen ĉi-vespere. Tiamaniere la impostpagantoj povas havi pli bonajn kontraŭaĵojn, instruilojn kaj instruistojn, kaj, ja, je multe pli malgranda kosto.

Pedagogistoj, konsciante ke la principo de kap-edukado sole ne estas vera kaj plena edukado, faras kursojn pri manedukado. Komencante je la plej malalta grado de l' elementa lernejo, ia formo de manlaboro estas tre grava kaj ankaŭ deviga parto de l' instruado. Unue la laboro konsistas el plektado de korboj kaj lanajoj laŭ la desegnoj de la Navajo (Návaĥo) Indianoj. Progresante ĝi fariĝas pli kaj pli malfacila. La knaboj lernas fari divers-specajn lignaĵojn, ĉiam objektojn kiujn ili povas uzi; la knabinoj lernas kudri. En la plej altaj klasoj de la elementa lernejo kaj ĉiuj klasoj de l' alta, la knaboj lernas fari diversajn lignameblarojn. Ili ankaŭ faras feraĵojn. En forĝejoj ili fondas partojn de maŝinoj, k. c. La knabinoj lernas pli malfacilan kudradon, kiel vestfaradon, kaj la kuirarton. Ili estas instruataj ne nur kuiri la manĝaĵojn sed ankaŭ servi kaj aranĝi la manĝon. La lernejoj havas labor-, kudro-kaj manĝoĉambrojn provizitajn per la plej bonaj iloj por ĉiu individua speco de studo. Tial la knaboj lernas uzi siajn manojn tiel kiel sian kapon, kaj la knabinoj estas instruataj pri artoj necesaj al vera hejmfarado.

Krom la multaj privataj lernejoj, la publikaj ankaŭ faras kursojn pri la diversaj temoj, kiuj rilatas komercon. Tiuj ĉi kursoj enhavas instruon pri stenografio, librotenado, kutimoj de bankoj kaj komercaj firmoj kaj skribado de komercaj leteroj.

La alta lernejo estas nomata «La kolegio de l' malriĉulo» kaj celas doni kiel eble plej grande edukon ĝeneralan, kaj kiu kapabligos la lernanton uzi praktike tion, kion li akiris.

Ĉiu Ŝtato ankaŭ havas siajn proprajn specialajn edukejojn, t. e. kolegiojn, universitatojn kaj lernejojn por dresi instruistojn. Granda nombro da Ŝtatoj instruas la terkulturan sciencan. Tiuj ĉi kursoj enhavas ne nur teoriant studadon, sed, vere, realan laboron sur la kampo: plugadon kaj rikoltadon kaj zorgon al la brutaro. Oni publikigas la rezulton de ilia eksperimentado je formo de pamfletoj, kiujn oni dissendas al la terkulturistoj por ilin helpi.

Estas en diversaj lokoj, Ŝtatlernejoj por tiuj, kiuj deziras studi la sciencan de minfosado kaj konstruado. La studentoj eniras ĉiujare en la minejojn, kaj studas ĉe loko mem la aplikadon de la principoj,

kiuj antaŭe ili studis teorie. Tiuj ĉi specialaj lernejoj, kiel ankaŭ la edukejoj por la dresado de instruistoj, celas eltrovi bonajn oficojn por tiuj, kiuj finas ĉeesti la kursojn.

En la kolegioj kaj universitatoj la lernantoj, je pli granda parto, estas aliurbaj. Ili luas ĉambron ĉe privataj familioj. Ne estas specialaj domoj por ili. Ofte grupo da studentoj kunigigas, dungas kuiriston kaj kelnerojn — la kelneroj estas ofte studentoj kiuj tiel laboras por gajni monon por siaj edukelspezoj — kaj plimalaltigas la manĝan koston.

La edukatoj estas kuraĝigataj ludi kaj helpataj de la lernejestroj. Je la diversaj sezonoj la ludoj estas foot ball (*), base ball (*), tennis (*) kaj konkursoj pri forto — kurado, ĵetado de pezaĵoj, saltado, k. t. p. La studentoj estas devigataj ekzerci sin regule, aŭ en gimnastikejoj aŭ en atletaj parkoj. La gimnastikejo enhavas vestejojn, ekzercejojn kun bonaj aparatoj, banejojn, spruĉbanojn kaj naĝejojn. Specialaj instruistoj zorgas pri tiuj ĉi fakoj. Oni lasas la lernantojn liberaj kiel eble plej multe, pensante ke tiel ili akiros dezirindan memfidecon, kaj kapablecon administri siajn proprajn aferojn.

La kunagado de l' gepatroj estas ne nur ŝatata sed eĉ petata. Ili estas ĉiam bone akceptataj en la lernejoj, kaj estas liberaj viziti siajn gefilojn iafaĵe.


Estas en ĉiuj ŝtatoj ekleziaj lernejoj subtenataj de la diversaj eklezioj. Tiuj ĉi lernejoj estas ekleziaj sed ne sektaj. Tio estas ili ne, ĝenerale, instruas ian specialan religian formon. La kursoj similas tiujn de la nesektaj lernejoj aŭ, alie, tiuj subtenataj de la ŝtatoj.

Ĉiujare la kolegioj kaj universitatoj dissendas instruistojn por ekzamenoj en la proksimajn altajn lernejojn por decidi, ĉu oni povas permesi la studentojn de la nomataj altaj lernejoj aliĝi kun ili sen rigida ekzameno. Se ia lernejo ne estas je la ĝusta grado ĝi restas neaprobata.

Reprezentantoj de la alta lernejo kun kiuj mi estis kunigita antaŭ ne longe, kunvenis kun tiuj de lernejo de alia urbo por diskuti demandon kiu rilatis publikan bonon. Tiaj konkursoj, kiel ankaŭ pri paroladarto, okazas ofte. La celo estas dresi la studentojn paroli publike sen ĝeno kaj pensi rapide, kaj estas tre bona ilo por edukado.

Mi ne estas sufiĉe malmodesta por pensi, eĉ unu momenton, ke tio, kion mi diris estas novaĵo. Niaj metodoj eble ne estas la plej bonaj; sed por helpi al la disvastiĝo de sciigoj pri tutmonda eduko mi priskribis kondiĉojn kiel ili vere estas. La juĝo, aŭ laŭdo aŭ mallaŭdo, favora aŭ malfavora estas en la manoj de la legantaro.

Se mi povus, per ĉi tiu artikolo, eksciti sentojn de intereso kaj elmontri, ke ĉe tiu ĉi marbordo, ni ne estas blinduloj rilate al Esperanto, mi estus trafinta mian celon.



MANLABOROJ DE LA LERNANTOJ.

E. L. ROBINSON.
TH. ROUSSEAU.
T. RUSO.

La raportanto:

(*) Elparolu fut bol. — bes bol. — tenis.

La Veroj Elementaj.

En sia numero de la 8^a de Januaro, la tre fama direktoro de la franca jurnalo ĉiutaga « L'Auto », enpresis veran leĝaron de la sportpreparado, kiun li deziras vidi afiŝitan en ĉiuj sportaj kluboj, kaj kiun li donas por tiu celo.

Ni reproduktas ĝin ĉi sube.

Resumita en 17 artikoloj, je kiuj oni ne povas aldoni aŭ eltiri eĉ unu vorton, tiu rimarkinda verko estas inda de la aprobo de ĉiu, kiu interesas sin je la fortekeco kaj bonfarto de la moderna homaro. Ni do ne povas tro inviti niajn legantojn por legi tiun artikolon kaj profiti ĝin. Ni memorigas ke la direktoro de « L'Auto », S^{ro} Henri Desgranges, konas ĝis fundo la sportajn fakojn kaj ni estas certaj ke ĉiuj, sportistoj kaj turistoj, estos dankaj al ni tial ke ni konigas tiujn konsilojn, kiuj estos tre ŝatinde divastigataj en la tuta mondo dank' al nia kara Esperanto.

La Konsiloj de Sportpreparado de la gazeto « L'Auto ».

Artikolo 1^a. — Kia ajn estas la sporto, kiun vi praktikas, konsideru ĉiam tiun sporton kiel ekzercon sanigan difinitan por konservi vian korpon en bona sano. La unua danĝero evitota estas do la troa laceco.

Art. 2^a. — Antaŭ ol praktiki iun ajn sporton, kiu nur povas fortikigi kelkajn el viaj muskoloj, praktiku nepre de 12 ĝis 18 jaroj, ĉiujn sportojn eblajn. Ili fortikigos vian tutan korpon.

Neniam komencu la praktikon de la sportoj aŭ de iu sporto sen la permeso de via kuracisto.

Art. 3^a. — Tiel longe kiel via plenumo korpa ne estas tute trafita, vi riskos vian sanecon, eble vian vivon, disputante konkursojn, aŭ tro longajn aŭ tro lacigajn.

Art. 4^a. — Kia ajn estas la allogo kiu estas por vi en ili, neniam disputu en la konkursoj pri daŭro, ne havante la nepran certecon, ke vi ne estas taŭgaj por la konkursoj pri rapideco.

Ne forgesu ke, pri atletismo, la rapideco valoras pli ol la daŭro.

Art. 5^a. — La ĉefa eco de atleto estas volo.

Art. 6^a. — La ĉefa malamiko de atleto estas la *Alkoholo*. Se via klubo havas sian ejon ĉe kafejestro, eksci ke li gajnas tiom per unu glaso da lakto, kiom per trinkaĵoj malsanigaj.

La alkoholo nur povas kaŭzi eksciton kaj fortekecon ŝajnajn. Ĝi deprenas la tutan flekseblecon de la muskoloj kaj igas ilin maltaŭgaj por la sportaj agadoj.

Art. 7^a. — La tabako estas tiel malbona kiel la alkoholo.

Art. 8^a. — La eksceso (trooj) iaj ajn estas malutilegaj por la sportpreparado.

Art. 9^a. — Vi devas trovi en via volo kaj en via inteligento la rimedojn necesajn por direkti mem vian sportpreparadon kaj decidi pri via taktiko en la kuradoj. Sportdirektisto (Manager) estas preskaŭ ĉiam maltaŭga konsilisto. Lia utileco estas

nur ebla por la metiisto kaj nur por la diskutado pri liaj monaj aferoj.

Art. 10^a. — Neniam sorbu drogojn. Glora sportaĵo havas nur valoron kiam ĝi estas plenumita per via cerbo kaj via korpo perfekte sanaj. La ekscito kiun vi produktas en vi mem, per sorbado de ia ajn drogo estas, rilate al vi mem, malbona agado, kiun vi certe rekomencos.

Art. 11^a. — Ne ekzistas metodo de sportpreparado. Tio estas ke ne ekzistas rimedo nepre certa por venki. Pri sistemo de sportpreparado, valoras nur tiu inteligento kiu scias dozi la penadon kaj proporcii ĝin al la korpaj rimedoj, kiujn oni disponas: valoras nur volo kaj penado al submetiĝo sub principoj de prudento kaj de vivado regula universale konataj.

Art. 12^a. — Via sportpreparado estu ĉiam progresanta. Trafu la grandajn penadojn kiuj estos via maksimumo nur paŝo post paŝo, kaj kiam vi estos trafintaj ĝin ne preteriru vian naturon, farante pli.

Art. 13^a. — Estas malbona kaj devas interrompigi la sportpreparadon, ĉiu laceco kiu kaŭzas sendormojn, kapdolorojn, dolorojn de stomako. Principe, se vi bone dormas kaj bone manĝas, vi certe ne trouzis sportpreparadon.

Art. 14^a. — Ne kredu ke vi restos trafintaj vian maksimuman sporttaŭgecon dum la tuta jaro. Elektu la konkursojn, kiujn vi deziras disputi, preparu vin konsciencie al tiuj konkursoj post kiuj vi praktikos nur la ekzercojn necesajn por konservi al vi la bonan sanon.

Art. 15^a. — Ne fidu al la rimedoj popularaj: ne estu superstiĉa; ne ankaŭ malhumila, aŭ vanta aŭ gloramantaĉa; malfidu pri la virinoj kiuj delogas vin; ili deziras nur malbonigi la fortekecon de viaj muskoloj.

Art. 16^e. — Se estas korpaj valoroj egalaj, estas ĉiam *inteligento* kaj *volo* kiuj donas venkon.

Art. 17^e. — Praktiki la sporton dum via tuta vivado estas la sola rimedo por vivadi maljuna.

L. DE GUESNET.



LA SUPRENĴETADO.

En Kanado la suprenĵetado estas sporta maniero honori iun, pro ĝia sprita aŭ sporta lerteco.


Ĝenerale, oni tiel suprenĵetadas iun estante sur neĝoŝuoj (rakedoj), en loko kovrita de 3-4 metroj da neĝo, por ke la suprenĵetito ne vundiĝu falante teren, okaze se la manoj ne estus sufiĉe fortaj por bone lin subteni. Decidinte aparte kiun tiel honori, oni ekkaptas la suprenĵetaton, renversas lin sur siajn manojn interplektitajn, kaj lin balancante, kalkulas ĝis tri; elparolinte tri! oni suprenĵetas la honoraton, atendante kaj ricevante lin per la manoj al li etenditaj. Prosperinte bone ricevi kaj subteni la suprenĵetiton, oni ripetas trifoje, tial. Tiu sporta ludo estas nomata « suprenĵetado ».

A. P. BEAUCHEMIN,
El Montréal (Kanado).



KANADA VINTRA SPORTO: LA SUPRENĴETADO.

La "runoj" kaj runaj rakontoj.



Taby, paroĥo Vallentuna, Upland.

kaj lia letero do fidine pravas, ke la runskribado estis tiam publike konata de l' pragermana loĝantaro de tiuj ĉi landoj.

La runskribado do karakterizis la pragermanajn naciojn. Neniu el aliaj nacioj uzis ĝin. Kaŭze de l' aliĝo al la kristanismo, la runoj frue estis sur la kontinento anstataŭitaj de la latinaj literoj. En Anglujo ilia uzado estis pli longedaŭra. En la skandinava Nordo la runoj tamen fariĝis plej komune uzataj, kaj tie okazis, ĉirkaŭe en la 800^a j., rimarkinda ŝanĝiĝo de la runaj formoj, samtempe kun rapida evolucio de la lingvo. Tiel la malpli frua, speciale skandinava 16- litera runaro estis kreita. Kompreneble estas, ke tiel malgranda nombro da literoj ne permesis laŭsonan skribadon, sed oni helpis sin por havi du aŭ plimultajn elparolojn per ĉiu el kelkaj literoj.

Dum la tuta mezepoko la runoj restis kiel skribo de l' popola kulturo, kaj en kelkaj paroĥoj de internlanda arbarregiono oni ĝis en la 18^a jarcento uzis la runskribadon. Eĉ en niaj tagoj oni tie povas renkonti homojn, kiuj povas sen klera helpo deĉifri la skribon de siaj prapatroj.

Oni trovas sur svedaj memorŝtonoj plej grandan nombron da ĝis nun restintaj antikvaj runskribaĵoj, kaj la provincoj ĉirkaŭ lago Melaren havas la ĉefan parton el tiuj ĉi. Sole la malnova kulturcentro Upland havas proksimume milon da tiaj ŝtonoj, kies plejmulto estis starigata en tiu periodo, kiam la idola kredo cedis kaj kristanismo etendiĝis tien.

La runoj ordinare ne donas al ni sciigojn pri famaj historiaj personoj aŭ okazoj. Sed ili estas des pli gravaj por la kulturhistorio.

Tre ofte la runoj parolas pri militiroj kaj aventuraj veturoj en malproksimajn landojn. Sur unu ŝtono (fig. 1) oni legas: « *Tora komisiis starigi tiun ĉi ŝtonon al sia filo Harald, frato de Ingvar. Ili kuraĝe migris malproksimen por oro, kaj oriente ili donis al aglo manĝon; mortis sude en Saracenujo* ».

Ankaŭ pacajn veturojn por komercado oni trovas preparolitajn: « *Sirid komisiis starigi ŝtonon al Sven, sia edzo. Li ofte velveturis Semgalon preter Domesnes, per multekosta ŝipo* ». Tio ĉi evidente koncernas veturojn de komercisto. Semgalo estas parto de Kurlando, kaj la plej norda landpinto inter Baltika maro kaj golfo de Riga estas nomita Domesnes.

Iam estas nur dirite, ke tiuj viroj, por kies memoro la runoj estis gravuritaj, migris orienten, sed iam estas pli precize dirite, ke Rusujo (Gardarike) aŭ Novgorod (Holmgord) estis celo de la veturoj. Ankaŭ Anglujo kaj eĉ Grekujo estas ofte nomitaj. La veturoj al Grekujo certe plej ofte celis militist-servon en gardistaro de l' imperiestro en Konstantinopolo. Pri Raguvald, viro el provinco Upland, runoj sciigas, ke li estis estro de la nomita gardistaro.

La cirkonstanco, ke virinoj ofte estas nomitaj sur la runaj ŝtonoj, atestas la estimatan rangon, kiun havis en Skandinavujo la virinoj. Sur ŝtono antaŭ nelonge trovita oni legas: « *Siba starigis ŝtonon pri sia edzino Rodcäud; ŝi mortis juna for de malgrandaj infanoj* ». Lingvosciencisto, kiu konatigis tiun ĉi enskribadon, skribis pri ĝi: « La enskribo estas kortuŝanta spite sia simpleco. El la sveda literaturo mi ne konas pli malnovan ateston pri la zorgo de vidvo por siaj senpatrinaj infanoj. »

Kiel jam estas dirite, granda nombro da runskribaĵoj devenas de tiu tempo, kiam la krista kredo etendiĝis. Ofta finiĝo: « *Dio helpu ĝian animon* » atestas tion. Pli ol cento da ŝtonoj rakontas pri personoj, kiuj por savi sian animon konstruis vojojn, pontojn aŭ rifugejojn. Ĉe Tebi, norde de Stokholmo, oni trovas tian « ponton », vojon trans marĉo, kun vicoj da ŝtonoj laŭlonge la flankoj. Sur unu el tiuj ĉi ŝtonoj (fig. 2) oni legas: « *Jariabanke starigis la jenajn ŝtonojn pri si mem, dum li vivis, kaj konstruis por sia animo tiun ĉi ponton, kaj li sole posedis tutan Tebi; Dio helpu tian animon.* »

Fama skulptaĵo sur ŝtonego en provinco Sudermanland montras scenojn el antikva legendo de Sigurd Favnisbane, kaj havas la jenan enskribadon: « *Sirid, patrino de Atrik kaj filino de Orm, faris tiun ĉi ponton por la animo de sia edzo Holmger; li estis patro de Sigred* ».

La lingvo de l' runaj ŝtonoj estas simpla kiel la ŝtonoj mem. Sed tamen, kiom da homaj sentoj estas esprimitaj tie. Ĉu ne estas vera romantiko en la miljara konteso: *Filino de Anund estas mia ĝojo; ŝi sidas apud sia brodstablo?* »


Alia ŝtono rakontas al ni: « *Iskurun, filino de Had, skulptigis pri si mem tiujn ĉi runojn. Ŝi volas migri orienten ĝis Jerusalemo.* » Kiu ajn povas laŭplaĉe imagi al si plenigon de tiu legendo, kies fragmenton oni tie ĉi legas. Kiu estis ŝi, kaj kial ŝi sopiris foriri? Ni scias nenion pri tio.

Por « Tra la Mondo », originale verkis

JOHN LUNDGREN.

el Hedemora (Svedujo).

Fig. 1a



Runa ŝtono proksime de Mariefred (provinco Sudermanland)

(1) Barbara fraxineis pingatur runa tabellis, quodque papyrus agit, virgula plana valet.



HISPANAJ GEREĜOJ

Ĉe la Hispana Kortego.

La Hispana kortego preparas sin al la naskiĝo de reĝido. La novelo estos tuj diskonigata per salvoj (pafaroj) el dudek unu kanonpafoj pafitaj ĉe l'Hipodromo (ĉevalkurejo), ĉe Las Vistillas, en la kazernoj de la Montana kaj malantaŭ la parko de l' Retiro.

La entuziasmo estas granda en Hispanujo, kie la naskiĝo de l' reĝa infano estas senpacience atendata.

Kiel kutime en Hispanujo, kiam la reĝinoj alvenas al la finiĝo de sia gravedeco, la sanktrestaĵoj de la Virgulino de la Cinta, protektantino de Tortona, provinco de Tarragone, estas transportitaj en la kapelo de l' Reĝa Palaco.

Ankaŭ laŭ la kutimo, la reĝino, akompanata de l' reĝo, estas farinta pilgrimojn al ĉiuj Madrid'aj preĝejoj.

Ni sendas al niaj transpireneaj amikoj niajn plej korajn dezirojn por feliĉa liberiĝo de ilia ĉarma regnestro.

« TRA LA MONDO.





Milita ekzekuto en Blidah.

Jam de longatempe la gardatrumpetisto estis sonoriginta en la nokta silento la malgajajn kaj malrapidajn moduladojn de l' fajr-estingo.

Ĉio dormadis en la kvartalo *Salignac-Fénelon*, kaj nur la rapidega galopo de ĉevalo kiu estis rompinta sian ligilon ĵetis, intertempe, bruon meze de tiu granda trankvileco, kiun sole malkvietigis la murmurado de l' folioj svingataj de l' venteto, kaj la kanto de l' griloj.


Subite sonorado, rapida, spireganta, densa, venis veki la multan militistaron dormantan.

Oni estis sonoranta la kunigon de l' « ĉefoj (1) », kaj al la sonoj de l' trumpeto respondis, kvazaŭ eĥo, en la soldatejo *Morland*, la klariono de l' tirajor'oj (indigenaj pafadistoj).

« Morgaŭ, je la sesa, la tuta regimento militire vestita, sur la manovra-kampo; — la « bluaj (2) » « iros piede; ekzekutata parado! » krias la semajnodejora rajda serĝento trairante la ĉambregojn kiel ventblovo, kun la jako malbutonumita kaj la kepo malrekta.

Malsuprenirado en la ŝtuparoj, granda bruo de piedingoj kaj de enbuŝaĵoj interfrapigantaj, blasfemoj kaj kriaĉoj de dormantoj subite vekigataj; poste ĉio silentiĝas kvazaŭ ensorĉe, tiel estas granda la sento pri la disciplino en la armeo.

* * *



ploteno de ĝendarmoj, alvenas galope mezen de l' kvadrato; homo de laŭtega aŭdigas: « Portu viajn armilojn! » La trumpetoj, la tamburoj sonas; poste, granda silentado...

Mi videtas, kvazaŭ en premsonĝo, soldaton de l' Afrikaj batalionoj, *un joyeux* (3), surgenuje antaŭ la blanka fosto, kun okuloj kovritaj per tuko.

La ekzekutata ploteno antaŭeniras, kun armiloj ŝargitaj. Glavo malleviĝas, eksplodbruo resonas... Justeco estas kontentigita!


Tamburoj, klarionoj kaj trumpetoj sonas, la muzikistaro de l' 1^a tirajor'oj (4) komencas marŝarion kaj la tuta garnizono pasas antaŭ la malfeliĉa heroo de tiu tragedio, kiun la morto senkulpigis.

« Souvenirs d'Afrique » de MAX. REBIÈRE,

Ano de l' grupo de Charenton.

Tradukis R. RIGOIR.

(1) Nomo mallongigata de l' rajdaj majorserĝentoj. — (2) Nomo en Francujo de l' novaj rekrutoj. — (3) Tiel oni nomas en Francujo la soldatojn de l' Afrikaj batalionoj, t. e. tiuj, kiuj antaŭ sia militservado, estas kondamnitaj je l' malliberejo. — (4) Mallongigaĵo por 1^a Regimento da tirajor'oj.



Kop irajto.

APUD LA PREĜEJO.

Fot. A. Georgiev.

La bulgara vilaga edziĝo.

De K. JANKOF kaj Leŭtenanto SILVESTRIEV (Bulgarujo).

IV. — La edziĝo.

Vendrede je l' vespero kiel en fraŭlhejmon, tiel en knabinhejmon oni alportas panfermentilon, per kio poste oni ekknedas la necesan panon por la edziĝo. Por ekknedi la panon, en knabinhejmon iras la estonta honora fraŭlservanto. La knabinoj — amikinoj de l' fianĉino, kantas, dum la honora fraŭlservanto ekknedas la panon, makulante lin per la faruno.

En tiu ĉi okazo estas kantata :

Ja¹ podájte² ĉesto³ sito⁴,
Kalinice⁵ mója⁶,
Ĉesto sito koprineno⁷
Kalinice mója
Da posejem⁸ v'momini dvori⁹
Da nájdem¹⁰ momà¹¹ dobrà¹²

Nu¹ donu² densan³ kribrilon⁴
Pli juna fraŭlfratineto⁵ mia⁶
Densan kribrilon silkan⁷
Pli juna fraŭlfratineto mia
Por kribreti⁸ en knabinkorto⁹
Por trovi¹⁰ bonan¹² knabinon¹¹.

Ĵus antaŭ la ekiro de la honora fraŭlservanto la fianĉino donacas al li multkoloran tukon. En fraŭlhejmo la pano estas ekknedata de knabino. El la bakitaj tortoj la du familioj interŝanĝas la duonon, kiujn ili disdonas al la alestantoj. La fraŭlhejmanoj luas fajfistojn, ludontajn de sabato ĝis merkredo.

Sabate, la honora fraŭlservanto, sekvita de fajfistoj, zonita per la multkolora tuko kaj portanta vinkruĉon, ĉirkaŭ kies buŝo estas alligita basiliko

iradas inviti por la edziĝo unue la baptonon, poste la fianĉinon, la pastron kaj fine la tutan parencon kaj konatularon. Oni same faras knabinflanke, sed nur virino invitas kaj ne viro.

Vendrede je l' vespero la baptono iras en la fraŭlhejmon, kie li estas regalata.

Sabate, antaŭtago de l'edziĝo, ĉiuj estas okupataj. Kutime dum ĉi tiu tago ĉiuj lavas, purigas. Nur je l' vespero en fianĉinhejmon kolektiĝas la kolegiinoj de l' knabino por rondedanci.

Dimanĉe la fraŭlhejmanoj kun fajfistoj iras ĉe la baptonon, kien jam kolektiĝis iliaj invititoj, nomataj subbaptonoj, kaj ilin alkondukas en fianĉinhejmon, el kie ili aliras ĉe l' fianĉinon. Je l' ekiro ella fraŭlhejmo ĉe fianĉinon virino prenas kribrilon, en kiun estas metita hordeo kaj komencas ĝin ĵeti sur ilin. Samtempe knabinoj kaj virinoj kantas :

Zarjakla e, potjakla
Momkova majĉica
Snaĥa da mu donesat
Vsé prez gorà da minat
Vetarat da ja ne duĥa
Sluce da ja ne greje,
Da e bjela, ĉervena,
Da e tnka, visoka.

Ekdiris kaj rediris
Fraŭlo, patrineto
Bofilinon al li alportu
Ĉiam tra arbaro pasu,
Por ke la vento ŝin ne forportu,
Suno ŝin ne brunigu.
Estu blanka, ruĝa,
Estu maldika, alta.

Kiam oni alvenas ĉe l' knabinhejmon, oni ĵetas ankaŭ hordeon sur la fraŭlhejmanojn.

Tuj ekmontriĝas la bofilo apud la pordo de l' ĉambro, kie estas la fianĉino; la knabinoj fermas el interne la pordon kaj ĝin ne malfermas ĝis li donos al ili donaceton. Tuj post la eniro de l' fianĉo en la ĉambron, la knabinoj vualas la fianĉinon. Tiam la bofilo alpaŝas la estontan sian edzinon per dekstra piedo kaj deflankiĝas apud ŝian dekstran flankon.

Ce l' knabinhejmo oni regaletas la fraŭlhejmanojn. Dum ili estas regalataj, oni ŝarĝas la donacon kaj doton sur kaleŝon. (La alportado de l' knabina doto okazas sabatvespere). Kiam la momento por iri en preĝejon alproksimiĝas, la gepatroj de l' knabino iras apud la gefianĉojn por « pardoniĝi ». La gefianĉoj kisas iliajn manojn, kaj la gepatroj donacas al ili po unu tuko multkolora, per kiu la gefianĉoj zonas siajn ŝultrojn. Dum la pardoniĝo, oni kantas:

Elĥa¹ se sviva², prjeviva³,
 Momà⁴ se s'ròda⁵ proštàva⁶ —
 Proštàvaj, ròdo goljèma⁷,
 I⁸ ti⁹ rojdèna¹⁰ mājèice¹¹.
 A¹² mājèica¹³ govòri¹⁴:
 Malçi¹⁵ ŝtèrko¹⁶, ne¹⁷ plaçi¹⁸ —
 I tũka¹⁹ mājka²⁰ i tàmò²¹,
 I tũka tåtko²² i tàmò,
 I tũka bråtja²³ i tàmò,
 I tũka sèstri²⁴ i tàmò.

Alno¹ fleksiĝas², trafleksiĝas³,
 Knabino⁴ kun gento⁵ pardoniĝas⁶ —
 Pardonu, gento granda⁷
 Kaj⁸ ci⁹ naska¹⁰ patrineto¹¹.
 Kaj¹² patrineto al ŝi¹³ parolas¹⁴:
 Silentu¹⁵ filino¹⁶, ne¹⁷ ploru¹⁸ —
 Ĉi tie¹⁹ ankaŭ patrino²⁰ kaj tie²¹
 Ĉi tie ankaŭ patreto²² kaj tie
 Ĉi tie ankaŭ fratoj²³ kaj tie,
 Ĉi tie ankaŭ fratinoj²⁴, kaj tie.

Elirante el la knabinhejmo, oni pafas per pistoloj. Post la edziĝo, kiam la edziĝanaro alvenas ĉe l' fraŭlhejmon, tie akceptas ilin la bopatrino de la junedzino kun du kaldronetoj da vino kaj panoj. Je l' pordo atendas ankaŭ du junaj edzinoj kun bulo da ruĝa fadeno. La junedzino prenas la kaldronetojn kaj la panojn. La aliaj junedzinoj sternas la ruĝan fadenon kaj la junaj geedzoj devas, paŝante sur ĝi iri al la unua ĉambro. Kiam ili eniris ĝin, la junedzino surverŝas la kvar ĉambrajn angulojn per vino.

(*) Vidu la *Martan Nov.*

Kiam la edziĝanaro eniras en domon, oni kantas:

Ràdvaj se¹ majko²,
 Radvaj se tatko³,
 Ĉe⁴ sin⁶ vi⁵ ide⁷,
 Snaĥa⁸ vi nosi⁹
 Pllen¹⁰ sandak¹¹ noŝi
 Vse¹² s'otbor¹³ dreĥi¹⁴
 Vse ot koprina¹⁵
 I dobri¹⁶ konopi¹⁷.

Ĝoju¹ patrino²
 Ĝoju patro³,
 Ke⁴ via⁵ filo⁶ venas⁷
 Bofilinon⁸ portas⁹
 Plen¹⁰ keston¹¹
 Tute¹² de elektita¹³ vestaĵo¹⁴
 Tute de silko¹⁵
 Kaj bonaj¹⁶ kanaboj¹⁷.

Post tio la baptono formetas vualon per du branĉetoj, traŭĉitaj el frukta arbo. La junedzino kisas lian manon.

Dimanĉvespere oni regalas la baptonon. Ĉe l' vespermangxo servas la junaj geedzoj, kiuj komplezas al la baptono, kies deziroj iafoje estas multe enigmaj.

Sed ili devas konjekti ilin, ĉar ili multe estimas sian baptonon, kaj diras: « Unu Dio kaj unu baptono ».

Lunde la junedzino verŝas akvon sur ĉiujn senescepte por ilin lavi, (dum ĉi tiu tago oni nigriĝas la vizaĝojn per ciro). Poste al ili, ŝi donacas ĉemizon, kaj ili donas al ŝi monon.

Saman tagon oni iras fraŭlhejmon, baptonhejmon kaj avinhejmon (de l' duonpatro de junedzo) kun brando kaj figoj. Vespere oni regalas la parencaron en fraŭl' kaj knabinhejmoj.

Mardon vespere en bofilhejmon iras ĉiuj liaj amikoj, kie ili estas regalataj.

Merkrede la edziĝofesto ĉesas. Tiun tagon oni regalas la honoran fraŭlservanton kaj bofilfratinon.

Post la edziĝofesto sekvas la mangadoj unue en avinhejmo (ordinare la unua post la edziĝo okazos merkredon), poste en baptonhejmo kaj ĉe la plej proksima parencaro. En tiu ĉi okazo la jungeedzoj

portas ordinare mangajon, kaj la vizitatoj donacas kuprajn vazojn al la geedzoj.




Speciale por
 « Tra la Mondo »
 de KSENOFONO ĴANKOF
 kaj I.^{to} SILVESTRIEV,
 Ŝamen (Bulgarujo).

Ilustraĵoj de
 PASTRO GEORGIEV.



NUNTEMPAĴOJ



LA RUINOJ DE L' IENA.

PRI L' EKSPLODO DE L' « IENA ».

Terura katastrofo okazis en la franca milithaveno Toulon. La 12^{an} de Marto, je 1,30 p. m. estis aŭdata kvazaŭ pafego, kaj samtempe dika kolono el ruĝa fumo ekstaris super la loko nomita Missiessy, kie troviĝas tri kavegoj fermitaj de kluzaj pordoj. (Du el ili, senakvigita, enhavis la kirasŝipojn « Suffren » kaj « Iena », kies eksteraĵo estis vizitata kaj pentrata kiel kutime ĉiuduonjare). Iom poste, dua kaj tria pafego aŭdiĝis, fajro fariĝis pli kaj pli densa. Ne plu estis dubo pri la terura okazantaĵo: L' « Iena » eksplodas kaj brulas!

Efektive ĉiuj malantaŭaj pulvejoj de tiu militŝipo eksplodis unu post alia disĵetante kvazaŭ pluve kuglegojn kaj ferajn pecojn disrompitajn.

Kaj daŭris la brulado...

De mia ŝipo, ankrita en la rodo je ĉirkaŭe 1000 metroj de la scenejo de tiu dramo, mi rigardadis, korpremita sed malfeliĉe senpova, tiun malgajegan vidaĵon. La konata silueto de tiu bela kirasŝipo apenaŭ vidiĝis ĉirkaŭata de densa fumo kaj de malhelaj ruĝaj flamoj.

Jam noktigiĝis kiam ekmalgreskis la fajro.

— Kiom stranga tia brulado de senligna fera ŝipo!..

Feliĉe, en tiu malfeliĉo, katastrofo ankoraŭ pli grava estis evitita. Venteto blovis, sed ne al kirasŝipo « Suffren », tute proksima de l' « Iena »; tamen brulanta disĵetaĵo falinta en ĉambron ekbruligis fajreton tuj estingitan: la « Suffren » estis savita.

Cetere la kluzoj de l' kavego enhavanta l' « Iena » estis malfermitaj kiel eble plej rapide.— Tion farante, mortis, kvazaŭ hakitita de fera hajlo, mia brava kamarado Leŭtenanto Roux.—La mara akvo iom post iom plenigis la kavegon suprenirante eksteren kaj internen de la brulanta ŝipo, kaj oni povis dronigi la antaŭajn pulvojn antaŭ ol la varmeĝo ilin eksplodigis.

Post la unuaj eksplodoj, ĉar neeble estis batali kontraŭ la fajro rapide kreskanta, oficiroj kaj maristoj de l' « Iena » forlasis sian ŝipon, nun kvazaŭa vulkano. Sed pli ol cento el ili estis mortigitaj tuj en la komenco, en la malantaŭa parto de l' ŝipo super la eksplodintaj pulvejoj. La ĉambrego de la helpaj maŝinoj kaj la oficiraj ĉambroj en la superaj etaĝoj estis tute detruitaj. Tie pereis per terura morto multaj homoj kies

korpoj disrompitaj kaj poste karbigintaj fariĝis preskaŭ nekoneblaj. Mortis ok oficiroj, el kiuj la ŝipestro kaj la stabestro; l' admiralo, ne grave vundita, sukcesis eliri tra sia balkono.

Nun tiu fiera militŝipo staras kiel restaĵo de kruelega batalo. Krom sia antaŭa parto, tute ne difektita, ĝi estas nur ĥaoso de nigraj aŭ flavaj feraĵoj, kies pentraĵa tavolo brulis kvazaŭ papero; ĉiuj ferdekoj estas kurbigitaj; pafilegoj preskaŭ falintaj ŝajnas abomenindaj ruinoj. Sed kiam oni malsupreniras en la kavegon, la vidaĵo estas ankoraŭ pli infera. Sub la kiraso, kiu tute ne falis, granda parto de la ŝipo ne ekzistas plu. Ambaŭ flankoj estas malfermitaj sur longo je ĉirkaŭe 15 metroj. Ĉiuj internaĵoj de tiu ventrego falis funden de l' kavego: kupraj tuboj vaporkondukantaj, elektraj maŝinoj, aro da kuglegoj ne eksplodintaj, kaj diversaj fumogrizaj feraĵoj sen ia difinita formo. Inter tiuj ĥaosaj restaĵoj, kuracistoj kaj laboristoj funebre serĉadis dum tri tagoj la disajn membrojn de la malfeliĉaj maŝinistoj, dispecigitaj en ilia posteno...

La franca militmaristaro ploras duoblan pardon: siajn multajn mortintojn kaj sian bonan kirasŝipon. Kruela Fatalo subite nin atakis kaj venkis per tiu katastrofo simila al mortiga batalo!

Leŭtenanto CHARLES FAHRNER,
el la « Saint-Louis ».

LA MORTO DE MARCELLIN BERTHELOT.

Lavoisier estis patro de la ĥemio minerala, Berthelot estas patro de la ĥemio organika. Tiun sciencan, kiu antaŭ unu ducentjaro ne ekzistis, oni al li ŝuldas. Li ja sukcesis, per simplaj elementoj, refari tiujn organikajojn tiel malsimplajn kaj misterajn el kiuj konsistas la vivaj estaĵoj.

Antaŭ li, la ĥemiisto povis nur *analizi*: li estis detruisto; per fajro, acidoj, saloj, li sukcesis dismeti la substancon vivan aŭ korpojn la plej malsimplajn; li sciigis tiel la konsiston internan de tiuj korpoj: « La ĥemiisto, diris la fama sveda scienculo Berzelius, agas tiel kontraŭe al la naturo vivanta ». Sed neniel li povis refari, per tiuj elementoj, la unuan substancon kiu ilin



MARCELLIN BERTHELOT EN SIA LABOREJO.

estis naskinta; li kredis tion farebla nur per nekonata forto, *viva forto*.

Berthelot pruvis, ke tiu hipotezo estas senutila: en naturo, leĝoj simplaj regas la formadon de korpoj. Liaj laboroj multege ŝanĝis la ideojn pri ĥemio montrante al ĝi novan vojon: *sintezon*. Ĝis Berthelot nenia alkoholo estis farebla arte, nenia karbido estis farebla per ĝiaj elementoj, karbogeno kaj hidrogeno. La fama scienculo faris tiun miraklon: per oksigeno, hidrogeno kaj karbogeno, li sukcesis fari acidon formikan.

Poste li atingis sintezon de alkoholoj, de hidrokarbidoj, oleoj, glicerino, k. t. p.: tio ĉi donis al ĥemio organika mirindan progresadon kaj revoluciiis tutajn industriojn, precipe tiun de materioj kolorantaj, eltiritaj el gudro kaj terkarbo.

Tamen li volis ankoraŭ plie laboradi, kaj fari per iliaj elementoj la korpojn la plej delikatajn kaj malsimplajn, kiujn oni povas trovi en naturo, la korpojn albuminojdojn kaj sukrajn, kiuj naskas la organismojn vivajn: « Tion atingonte, li diris, la scienco povos efektiviĝi tute la principon sintezan, t. e. reprodukti, per elementoj, per nura uzo de fortoj molekularaj, la aron de komponaĵoj naturaj kaj de metamorfozoj ĥemiaj de la materio interne de estaĵoj vivaj. »

Per sia tuta fido por scienco, li estis konvinkiginta, ke iam oni venkos la sekretojn de la naturo, kaj tiam li certigis, en mirinda parolado, fama en tutmondo, ke homo sukcesos efektiviĝi la tutan ŝanĝon de nunaj kondiĉoj de vivo; homo povos sin nutri, per alimentoj ĥemie faritaj, kaj konsistantaj nur el kvantoj sufiĉaj de karbogeno, oksigeno, azoto kaj hidrogeno, kiujn li bezonas.

Kun nelacebla energio li senĉese laboradis. Dum la lastaj monatoj de sia vivo, en sia laborejo de Meudon, li plibonigis eltrovon, kiu permesos ŝanĝi tute, post pli malpli longa tempo, tutan terlaboron. Li estis efektive sukcesinta fari industric kaj sinteze azotikacidon kaj azotatojn, per oksigeno kaj azoto de aero kombiniĝintaj kun hidrogeno de akvo.

El tiuj eksperimentoj, elserĉoj, eltrovoj, kiuj estus povintaj riĉiĝigi alian serĉulon, Berthelot eltiris nenian profiton: al Francujo kaj al Scienco li ilin donacis.

Kiam, en la jubileo de la 25 nov. 1901, scienculoj de ĉiuj nacioj kunvenis por lin honori, kaj donaci memoran medalon, Berthelot, post danko, diris ke li vidis en tiu elmontro nur « saluton al homo aŭtaŭ lia malapero en la eterna morto » kaj aldonis tiujn vortojn, por klarigi, kiel li komprenis la rolon de scienculo:

« Tiu rolo pligrandiĝis senĉese en la nunaj ŝtatoj. Sed niaj devoj al la homoj pligrandiĝas samtempe, ni ne tion forgesu. Ni proklamu tion en tiu ĉambro, en palaco de franca scienco. Ne por egoista kontenteco de nia malhumileco la tutmondo honoras scienculojn. Ne! sed tial ke oni scias, ke scienculo vere inda je tiu nomo, uzas sian vivon malprofiteme por la granda laboro de nia epoko, t. e. por la plibonigo, tro malrapide ho ve!

de ĉiuj, de riĉuloj kaj feliĉuloj, tiel, kiel de humiluloj, malriĉuloj, suferantoj! Tion ĉi la registaro certigis, antaŭ 9 jaroj, en tiu ĉambro mem, honorante Pasteur'on. Mi ne scias, ĉu mi tute plenumis tiun idealon, sed almenaŭ mi penadis por fari el tio la objekton kaj la celon konduktantan de mia vivo! »

La franca popolo honoris Berthelot'on, kondukante lin al Pantheon, templo de grandaj homoj kaj Sro Briand diris faman paroladon, el kiu mi eltiras tiujn elokventajn kaj energiajn vortojn: « Eble li estus preferinta uzi sian tutan tempon por siaj studioj amataj, sed, kiam la neceso publika iris alvoki lin, kiam ĝi petegis lin, uzi sian sciencan por defendi la nacion, la instruadon, la politikon, Marcellin Berthelot simple akceptis tiun laboron, kaj ni devas tiel hodiaŭ honori samtempe la scienculon, la filozofon, la edukiston, kaj... la Fonestulon. Berthelot estis tre alte metinta sian idealon de scienculo; scienco estas lia plej alta celo, la plej nobla, kiun oni povas oferi al homoj, la kialo de ilia plej bona aktiveco, kaj eĉ la sanktigiĝo de la vivo. Laŭ lia ideo, ne ekzistas scienco *pozitiva*, elserĉanta en mondo de faroj materiaj, sed ankoraŭ estas scienco *ideala*, « kiu sen helpo de volo privata, ekstera al fenomenoj naturaj, lumigas per ĝia lumo al la morala mondo. »

MARCEL FINOT.

Ĉi sube ni donas tradukon de paĝo de Berthelot, montranta la allecon de lia penso.

La estonteco de la Scienco.

La scienco montras al ni ke, en ĉiuj fakoj, la profitoj de homoj estas solidaraj, tiel en fako de la vivo privata kaj de la saneco individua, kiel en fako de la vivo ara.

La sperto de la historio pruvas, ke tio estis ĉiam tia, por malsamideco de la popoloj, tiel, kiel de la individuoj. La batalado kaj la imperialismo kaŭzis, ordinare, la ruinigon de tiuj, kiuj per ili elserĉis sian riĉecon. Ĉiu domaĝo kaŭzita al ia popolo aŭ individuo estas pereco por ĉiuj: pereco materia, detruo senfrukta de parto de valoraĵoj al ili rabitaj; pereco morala, ankoraŭ pli grava, por malfortigado de ligiloj naturaj kiuj ligas la homojn unu al la alia.

Tiu ĉi solidareco estas do ne pura abstrakto: mi aldonos, ke ĝi estas en esteco mem de la scienco nuntempa, tial ke ĝi prezidas al ĝia vastigo. Ĉiu verko scienca estas verko opa; nenia eltrovo estas izolata; sed kia ajn estu la genio individua de la eltrovisto, tiel en teorio, kiel en praktiko, lia verko eluzas necese tiel la aron de eltrovoj antaŭaj de serĉistoj, kiuj antaŭ li laboris, kiel la penadoj pli malpli feliĉaj de liaj samtempanoj. La scienco estas, ni tion rediras, opa verko, naskiĝinta el sindoneco profesia de scienculoj al vereco pura aŭ praktika. Ĝi elnecesigas, por tiu, kiu ĝin serĉas, samtempe la respekton de la vereco kaj la senton de la ofero, kiu el ĝi estas nedisigebla. Tial do la verko de la scienco estas precipe verko de paco, fondita por profito kaj feliĉo de ĉiuj. Ĝi devas apogi sin sur akcepto reciproka de scienculoj kaj lernantoj kaj sur simpatio frata de ĉiuj: simpatio tiom pli bone pravigita, ke ni kolektas hodiaŭ la frukton de la laboroj de nia antaŭularo kaj ni devas transdoni tiun heredon pligrandigitan al nia posteularo.

Tiuj ĉi veraĵoj propagandiĝas, hodiaŭ, inter la pensistoj kaj la nacioj; ili celas ankonduki aliformigon ĝeneralan de la ŝtatoj, sufiĉe rapide por antaŭsciigi la vastajn internajn kaj internaciajn konfliktojn, kiuj minacas la nuntempajn popolojn. Ĝis nune, per intermeto de la perforto okazis la plej grandaj sociaj ŝanĝoj. Tamen estas certa, ke la popoloj kaj la regnestaroj suferas la influon pligrandigitan de la konvinkoj truditaj de la scienco kaj kiuj fine determinas la vojojn pripensitajn de la plej granda parto de la homoj civilizaj.


Per tiu espero, ni propagandu ĉie la edukadon sciencon, en ĝiaj formoj materiaj kaj moralaj la plej kompreneblaj: eble ni sukcesos foririgi tiujn batalojn kaj tiujn malfeliĉaĵojn, kaj alkonduki fine la tempojn benotajn de la egaleco kaj de la frateco de ĉiuj homoj, solidarigitaj de la sankta leĝo de la laboro! Tia estas la idealo, kiun la moderna scienco instruas al la raso homa!

MARCELLIN BERTHELOT.

Esperantigita de MARCEL FINOT.



TRA LA MODO



Kun tre malgaja mieno mi trempas mian plumon en mian inkujon, kaj apogante mian kapon sur mia maldekstra mano, mi malĝoje pensas: «Ĉu mi daŭrigas miajn kronikojn pri la Modo, aŭ ĉu mi ĉesigas ilin?» Kial? Ha! amikinoj, tial ke mi havas terurajn timojn; ho! vere — tiel vere kiel Tra la Mondo estas la plej interesa el ĉiuj niaj gazetoj — mi pli amuz min

senigi je la tamen tiel agrabla plezuro babiladi kun vi, amataj samideaninoj, ol sciigi al vi, ke... ke... Nu! kuraĝon!... ke reaperis la *fourrure*, t. e. la falsaj post-ajoj. Jes, antaŭ kelkaj monatoj, estis parolate pri la renaskiĝo de l' krinolino, kio, ho! feliĉo, estis akceptata per ĝenerala malaprobo. Precipe la sinjoroj — dankindaj pro ilia amo al la estetiko — montris grandegan malsaton al tiu malbel-egedegega monumento. Kaj nun, mi ne scias kia malsprita serĉemulo dissemis la famon, ke la falsaj postajoj estos tre baldaŭ modaj. Ni ribelu; ni ĥore kaj laŭte protestadu, ni ĉiuj Esperantistinoj, kiuj nepre estas progresemaj: estas nekontraŭdireble, ke alpreni tian modon estas malantaŭeniri. Kiom da pravaj motivoj havas la edzo, por moki ridi je la karolino, kiam li vidus en ŝia tualetejo, apud la nune necesega korbelo de falsaj haroj, la korbelen de falsaj postajoj!... Fine, mi esperu ke tiu famo estas falsa, — ĉar tiu ĉi vorto estas en la tagordo.

Malgraŭ mia kolero kontraŭ nia Diino — kelkafoje tute ne adorinda — pri ĝi mi estas devigata paroli iom. Iom estas tie ĉi ĝusta esprimo; ja, mi havas malmulte por diri. La malvarmega vintro sendube prokrastis la unuajn kreaĵojn de la Moda Moŝto. Ĝis nun, nenio rimarkinda, nenio notinda ŝanĝo. La novaj modeloj tute similas al la modeloj de la antaŭa sezono: mallongigita busto, plilargigitaj ŝultroj, tre larĝaj maniklokoj, japanaj maniketoj, k. c. Pli kaj pli mallongaj estas la manikoj kiuj ofte ŝajnas esti nur falbalo — eĉ ĉe la kostumo-tajloro laŭ la plej angla modo — sub kiu eliĝas la duone aŭ tri kvarone longaj manikoj de la ĉemizeto el tolaĵo, brodaĵo, punto. Ĉar tiu ĉi vorto «punto» venis sub mian plumon, mi tuj sciigos, ke ĉarma kaj nekomuna novaĵo estas la punto el ŝnureto, kiu estas modega. Modegaj ankaŭ — kiel ĉio kio estas nova — la punktoj kolorigitaj (bluaj, verdaj, rozkoloraj, violkoloraj, k. a.) el kiuj oni faras ĉemizetojn samnuancajn kiel la robo.

Ankoraŭ pli mallongaj, se tio estas ebla, la paltetoj el tafto, pleje pulkoloraj. Ne ridetu, legantinoj miaj; tiu ĉi nuanco estas tre ŝatata. Tre elegantaj la jaketoj laŭ la Direktoria modo kun rondigitaj baskoj tre malfermitaj antaŭe. Pli praktika la palteto *Sada-Yacco* el nigra drapo kun veŝto el aŭtentika japana brodaĵo.

Pli kaj pli vidiĝas la influo de l' japana stilo. La lasta krio de la Modo estas la larĝa kaj longa zonumo, (2 m. 50) kun dika banto «laŭ la Japanino» ofte simila al la skarpo de l' ĉapelo, el vapora silko kies desegnaĵoj multkoloraj estas tre diversaj.

Multe uzata la kapridledo, el kiu estas la rubando ĉirkaŭanta la ĉapelon kaj ĝia buko, same kiel la kolumo, la returnaĵoj de l' manikoj kaj poŝoj de l' robo, kaj ankaŭ la zonumo kaj la mansaketo. El samkolora ledpo povos esti la gantoj kaj piedvestoj; sed, kompreneble, kondiĉe ke oni elektos belvidiĝan nuancon. Dank' al la *pirogravuro* estos facile havi tute proprajn ornamaĵojn.

Tute citindaj la beletaj kolumoj el perlamoj brilajetoj, kiujn oni metas sur kian ajn tualeton.

Koncerne la teksaĵojn, la sukceso de l' sezono estas la *tussor* (diksilka ŝtofo, por tiel diri kruda, natura).

Nia modelo estas el malpeza teksaĵo ornamita per brodaĵo el Irlando. Returnaĵoj, kravato kaj zonumo estas el tafto, atlaso aŭ *tussor*. La jupo faldita konsistas el kvin partoj.

ROKSANO.

Mallonga korespondado.

Elegantulino. — Jes, la nebelaj haroj malaperas, la haŭto kaj la dentoj fariĝas blankaj per la «oxygenopoudre» uzata de ĉiuj aktorinoj kaj rekomendata de la kuracistoj. Mi estas tre kontenta pri ĝi. La firmo «Oxygene», 101, boulevard Sébastopol, Parizo, sendas kvar bluaĵn ujojn tuj post la ricevo de mandato da 5 frankoj, 60 c.

Fervora Esperantistino. — Mia respondo alvenis iom malfrue por sciigi al vi, ke malgraŭ la malvarmo oni devas lavi sian hararon po unu fojo ĉiumonate. Dum la varma sezono, almenaŭ ĉiuduonmonate. Dekokcio (1) el ligno el Panamo tre taŭgas por la brunaj haroj. Dekokcio el tilio por la blondaj.

Sinjorino P. en Praha. — Mi tre ĝojas pro tio, ke la modeloj kiujn mi montras en T. I. M. treege plaĉas al vi, kaj korvarme dankas pro viaj tro laŭdaj gratuloj. Jes, mi povas sendi al vi la patronon kiun vi deziras. Jen estas la tarifo: Mallonga jaketo, korsajo, bolero, ne ornamitaj; fr. 2,60. — La samaj, ornamitaj; fr. 3,60. — Jupo simpla; fr. 2,10. — Jupo faldita, kun falbaloj aŭ ornamita; fr. 2,60. Bon-

volu aldoni la sendelspezojn.

Ne forgesi aldoni la necesajn poŝmarkojn por ricevi respondon ĉu private, ĉu per la revuo. Sin turni al Roksano, 1, rue Andoque. Béziers. France.

R.



El la *Mode Parisienne*
MODELO BACHWITZ.

(1) Latine: decoctus. — France: décoction. — Angle: decoction. — Hispane: decoccion.



Aprila Fabelo.

Originalo de Pro BORD (Francujo).

Estis foje, granda, granda Sinjoro. Lia ombro pligrandiĝis sur la strato kiel longa griza rubando. Lia barbo prezentiĝis antaŭ la suno kiel ora ventumilo kaj liaj okuloj markoloraj naskis dolĉajn ridetojn.

Ankaŭ estis eta, eta Knabineto. Ŝi marŝetis kiel beleta blanka museto. Dum ŝi babiladetiĝis, oni aŭdis kvazaŭ kantadon de malproksima fluto.

Unu tagon, la granda sinjoro kaj la eta knabineto sin renkontis sur la urba placo. Li kliniĝis: « bonan tagon, Terezo, Terezineto ». Ŝi lin kisis: « bonan tagon, mia onko. » (ŝi volis elparoli: *onklo*) kaj unuigitaj per la manoj, ili tuj faris promenadon tra la parko de *Kvar Sezonoj*.

Unue, ili eniris en la ĝardenon de *Kavaliro Printempo*. Sur la bordo de aleoj, ĉiuspecaj rozoj ruĝiĝis kiam la timemaj papilioj alproksimiĝis por spiri iliajn parfumajn odorojn. Floraj arbetoj agrablan ombron disdonis, kaj, sur la branĉoj, orkestro de multkoloraj birdoj, komandata de najtingalo frapanta la takton, pleniĝis la aeron per melodias triloj.

Alvenis *Kavaliro Printempo* vestita per blanka lilio, lia ĉapelo estis blua primolo. Li balancadis, kiel verŝilo malfermitan, kalikon de granda tulipo, kaj displuvigis gutojn de roso sur l'odoran floraron, kien abeloj kun flava korsajeto alkuris zumante por trinketi sukeraĵojn.

Ternjo kontraŭ la flabla ĝardenisto faris sian plej ĉarman riverencon. *Sinjoro Printempo* kontentigita, la vangojn de la knabineto per la mano iomete tuŝetis. Tuj oni ekvidis sur ŝia lilia haŭto du rozkolorajn florfoliojn, kaj de tiu ĉi momento la kisoj de la patrineto neniam forigis for ŝia vizaĝo la preferitan koloron de *Kavaliro Printempo*.

Pli malproksime, la onklo kaj Terezo eniris en la ĝardenon de *Grafo Somero*. Sub la brila arkaĵo de lazura ĉielo, ili marŝis sur herbaroj diversverdaj kun lekantoj kaj sovaĝaj papavoj. Tie ĉi kaj tie, fieraj palmarboj kun akra foliaro siajn maldikajn kolonetojn plialtigis.

Grafo Somero havis veston brilantan kiel stelaro pro multekostaj ŝtonetoj. Liaj okuloj konsistis el du diamantoj tiel brilegaj, ke oni ne povis longe ilin rigardi. El lia korpo simila al helega suno, eliradis mil kaj mil oraj sagoj.

Ekvidante Terezon, *Sinjoro Somero* per lerta mano ĵetis unu oran sagon en la riĉan hararon de la eta knabineto. Kiel ensorĉe, ŝiaj haroj ricevis la koloron de maturaj spikoj kaj diŝjetis orumajn briletojn. Samtempe la onklo, ne povante suferi la varmecon de *Grafo Somero*, zorge spongis sian ŝvitan kranion kaj dekondukis la nevineton en la fruktoĝardenon de *Duko Aŭtuno*.

* * *

Tie ili spiris plezure. La aero enhavis odorojn de persikoj kajabrikotoj. Laŭlonge multenombraj fruktarboj prezentis rektajn vicojn kiel soldatoj dum parado. La geamikoj malrapide promenadis admirante la flavon de oranĝoj kaj la purpuron de ĉerizoj. Jen estis pomoj tiel dikaj kiel Burgonja barelo kaj prunoj kapablaj anstataŭi kuglegojn.

Duko Aŭtuno sidiĝis kontraŭ belega granatujo alta kiel preĝejo sonorilejo. Lia kapo similis al grandega piro kaj lia trumpeta nazo memorigis belan maturan fragon. Lia ĵako estis farita per multnombraj folioj de migdalujo kaj liaj ŝuoj per laka ŝelo de bruna kaŝtano. Terezo ekridegis kaj frapis siajn manetojn ekvidante tiun ĉi kvietan ĝardeniston, kies okuloj tute indikis la bonecon kaj la konfidon. Ĉar ŝi estis kuraĝigita pro tiom da aventuroj, ŝi tre ĝentile petis al li la permeson gustumi unu el tiuj ĉi delikataj fruktoj, kiuj pendis antaŭ la manoj.

Lia *Aŭtuna Moŝto* stariĝis, kolektis granaton kaj respektive donacis ĝin al Terezo, kiu tuj mordis je plendentetoj. Tial ŝi havas lipojn tiel ruĝajn ke, dum ŝia ridado, oni opinius vidi granaton preskaŭ malfermiĝintan.

* * *

Niaj kunpromenantoj novajn surprizojn havis, kiam ili eniris en la ĝardenon de *Markizo Vintro*.

— *Brrr!*, ekdiris la onklo levante la kolumon de sia ĵako.

— Kian mirindan vidaĵon! ekkriis la nevineto.

La tero kaj la ĉielo, la floroj kaj la arboj, la birdoj kaj la bestoj, ĉio estis diversblanke blanka. Blankaj kiel la neĝo, densaj arbaretoj; blankaj kiel l' *Amiko Peĉjo* aŭ krema fromaĝo, disflugantaj birdoj; blankaj kiel marmoro, arĝento, elefantosto, ĉiuj estaĵoj. Unuvorte ĝardeno kovrita iom per prujno, faruno, rizpudro. Senĉesa silento disvastiĝis super tiuj ĉi blankaĵoj, eĉ ne interrompata pro la paŝoj de la du

gevizitantoj, kiuj marŝadis sur kvazaŭ tapiŝo el molega vato.

Ankoraŭ ili ekvidis la maljunan *Vintron* vestitan per travidebla glaciaĵo kun longa kotona barbo. Neĝeroj flugetadis ĉirkaŭ li kiel beletaj blankaj papilioj. Terezo antaŭeniris, sed tuj kiam ŝi alproksimiĝis, la mantelo de *Markizo Vintro* ŝajnis fluidiĝi kaj verŝi glaciajn larmojn. Tiam la onklo, preminte la malvarmegan manon de *Sinjoro Glaculo*, rapidege fortiris la knabinecon ĝis la elirejo.

* * *

Nun ili denove ĉeestis ĉe la sunbrila placo kaj iliaj ombroj dancadis ĝoje.

— Kial vi estas forestitaj tiel longatempe? ekkriis la patrino de Ternjo. Mi timis ne plu revidi vin. Sed kion? Mi trovas vin tute aliformigitaj!...

— Jes, diris la onklo ridetante. Aŭskultu, kara mia. Ni promenadis en la parko de *Kvar Sezonoj*. *Sinjoro Printempo* donacis al Terezino rozajn vangojn. *Sinjoro Somero* ŝiajn harojn origis. *Sinjoro Aŭtuno* ŝiajn lipojn purpurigis. Sed mi eltiris ŝin el *Sinjoro Vintro* por ke ŝi ne malvarmumu.

— Mirinde! rediris la patreto, kisante la karulineton. Sed, amiko mia, kion ili donacis al vi?

— Mi, rigardu, mi premis la manon de *Markizo Vintro* kaj mi ricevis neĝerojn sur la barbon.

BORD.

La unua tago de mia dek-oka jaro.

Monologo por junulinoj.



Fot. Paulus.

ROKSANO.

Kiel malĝoje sin prezentas mia dekoka jaro!!! Antaŭ du tagoj kiu estus antaŭvidinta tiun ĉi teruran malfeliĝegon, kiam kun komika mieno mi serioze diris: «Postmorgaŭ mi estos grava persono, mi estos junulino, kiun la sinjoroj respektu alparolos kun la ĉapelo en la mano.» Mi estis gaja kaj brua knabino, kaj hodiaŭ... hodiaŭ, ho ve!... Hi! Hi! Hi!... mi estas malgaja, nekonsolebla junulino.

Kiom senkompata estas iafoje la sorto! La hodiaŭa tago tiel varme deziregata fine alvenis, sed kun ĝi alvenis ankaŭ mortiga ĉagreno: hodiaŭ matene mortis estaĵo, kiun de tri jaroj

mi amis el mia tuta koro. Nepriskribebla okazintaĵo!!! Hi! Hi! Hi!... Karega estaĵo, mi neniam vin revidos! Sed la fotografaĵo, kiu vin prezentas belmove sidantan ĉe miaj piedoj kiel la plej fidele amanto, ĉiam restos en mia dormoĉambro ĉe la honora loko. Mi tiel multe vin amas, kaj mi plu ne trapasos miajn fingrojn tra viaj belaj brunaj bukloj! Mi plu ne vidos viajn grandegajn okulojn kaŝtankolorajn — mi malŝatas, eĉ malamas la alikolorajn okulojn — ame rigardantaj min kaj brilantaj pro feliĉo, kiam al vi mi prezentis mian manon, por ke vi ĝin kisadu, kaj kiam, rigardinte ĉu neniu nin vidis kaj mi aŭdis — ĉar sendube oni estus riproĉinta min — mi diris al vi: (Mi estis tiel ridema, tiel frenezeta) «Venu, Sinjoro, venu proksimen, tre proksimen al mi; sur la pinto de via nazo mi volas fari kisojn pli malpezajn ol la venteto.» Tiam, pli rapida ol la fulmo, sur miaj vangoj, sur miaj okuloj, kaj... kelkafoje... por ne diri ofte... sur miaj lipoj, friponeto, vi faris frenezajn kisojn. Via malmitego min timigis, kaj forte mi riproĉis vin, sed vi tuj fariĝis tiel humila, viaj inteligentaj okuloj tiel mallheligis, vi tiel malsupren klinis vian kapon, ke mi rapidis pardoni. Kiu el ni ambaŭ tiam estis la plej feliĉa? Mi ne scias: en via koro mia amo trovis tian respondecon!!! Mi estis tiel sincere amata!!! Ho! jes, sincere. Mi povas fieriĝi pro tio, ke vi amis min, nur min, ĉiam min. Kia mirinda fideleco estis la via!!! Mi memoras kion ĝoje batadis mia koro, kiam miaj amikinoj havis por vi kelkajn komplezojn: vi faris tiel malafablan mienon, ke ili vin nomis «sovaĝulo.» Kaj tiam, kiel almozulo, vi rekompence ŝajnis petegi de mi karesan rigardon. Ha! Kiel senkondiĉa estis nia reciproka amo! kaj nun... — Ho! al mi ŝajnas ke mia koro tuj krevos — kaj nun mi estas sola, sola sen vi, adorata kreitaĵo. Adiaŭon al miaj dolĉegaj horoj da babilado! Adiaŭon al la ĝojo de mia vivo! Adiaŭon al mia feliĉo! Neniu kaj nenio min konsolos; ĉar mi neniam estos tiel vere kaj fidele amata!

Hodiaŭ vespere mi ne ĉeestos en la festeno kaj en la balo

donitaj je la okazo de mia dek-oka jaro. Mia unua balo, tamen! Sed ne, en ĝin mi ne iros; mia koro estas tro kruele disŝirita; mi ŝajnis min malsana.

Antaŭ kelkaj momentoj mia granda frato, vidante miajn larmojn fluadantaj, kaj aŭdante miajn korŝirantaj plendojn, diris al mi: «Ho! Roksano, estu do saĝa. Je via aĝo, la ĉagrenoj estas tiel rapide forgesitaj, kaj mi konas iun, kiu estos feliĉa konsoli vin. Venu en la salonon por rigardi la bukedojn alportitajn por vi; vi vidos ke la plej bela el ĉiuj estas sendita de mia amiko Justeno. Li estas ĉarma brunulo, mia amiko; kaj li opinias, ke mia Roksano... sed kial mi tion diros? Tio tute ne interesas mian nekonsoleblulinon; kaj tamen mi scias... sed estos preferinde se mi silentiĝos, ĉar vi estas konvinkita, ke vi neniam estos vere kaj fidele amata.» Tion dirante mia bona frato malice kaj mistere rigardis min. Kion signifas liaj diroj? Ĉu hazarde...? Jes, mi komprenas. De kelke da tempo mi rimarkis ja, ke sinjor' Justeno — kiel belsona estas tiu ĉi nomo! Justeno!! Justeno!! Vere, ĝi estas tiel dolĉa kiel melodio — ke Sinjor' Justeno longe rigardis min; eĉ kelkafoje tiu persisteco min ĝenis... Mi tamen konfesas, ke tiu ĝeno havis ion strange agrablan, ion... ion ne-nomeblan. Ili estas tiel belaj, tiel karesemaj la bluaĵoj de Jus... de Sinjor' Justeno. Ili estas tiel helaj, ke en ili ŝajnas, ke oni vidas lian belan animon. Certe, mia frato estas prava dirante, ke lia amiko estas ĉarma. Li estas ankaŭ tute meritplena... laŭ la diro de miaj gepatroj kaj de la kompetentuloj. Oni certigas, ke li estos la maloftega perlo el la adorindaj edzetoj. Kaj... kaj... — Ho! jes, tio estas certa; multaj aferoj estas nun klarigitaj por mi. — Tiu ĉi maloftega trezoro estas destinata al mi. Feliĉega Roksano, kun Li vi konfide pasos tra la vivado! Ho! kiel ĝoje sin prezentas mia dek-oka jaro!... Ĉielo! Kion mi ĵus diris? Ĉu mi fariĝas senkora? Ĉu mi fariĝas forgesema? Ĉu mi jam ne memoras pri la amegata amiko mortinta antaŭ kelkaj horoj? Karega estaĵo, pardonu, pardonu, mi vin amas... mi vin amos ĉiam, ĉiam, ho! mia Justeno. Justaj dioj!! Se iu min aŭdis, oni kredus ja, ke mi jam pensas pri mia estonta fianĉo. Oni ne konjektus, ke mi freneziga pro tio, ke mi plu ne revidos tiujn varmege amatajn bluaĵoj... — Ho! Mia nedirebla doloro konfuzas miajn ideojn — tiujn varmege amatajn kaŝtankolorajn okulojn.

Por kvietigi mian multpezan ĉagrenon, se mi provus sur mi mian unuan longan ĵupon, mian unuan balan robon. «Vi estos ideale bela» diris mia kudristino, kaj ŝi tute ne estas flatema. Mia koro saltegas pensante, ke hodiaŭ vespere mia Just..... Sinjor' Justeno admire rigardados min. Kaj kiu scias? Ho! Ebriiga penso!... Jes, mi iros en la balon, kaj kiel malrapide forflugos la horoj min apartigantaj de tiu vesperkunveno dum kiu — mi tute ne dubas pri tio: la virina intuicio estas ne-rarema!! — dum kiu komenciĝos por mi nova epoko, kiu estos longa sekvo da ĝojo, feliĉo, amo! Sed mi ne forgesos la multamatan mortinton. Kiam dum mia unua valso, Li ĉe mia orelo dolĉe murmuro kortusantan ankconfeson, mi respondos: «Certe, mi ĝojos permesi, ke vi min amu, sed kondiĉe ke... vi pajlremburigos mian amatan Chicot', mian bedaŭregatan hundon mortintan hodiaŭ matene, por ke dum mia tuta vivo mi havu antaŭ la okuloj la fidelan amikon de mia juneco.» Ho! Unua tago de mia dek-oka jaro, vi estas samtempe malĝoja kaj ĝoja; ĉar kun vi finiĝas mia knabina amo, kaj komenciĝas mia virina amo!

Originale verkita de
ROKSANO.

PRI ESPERANTO

EL JAPANUJO.

La lasta Numero de nia malproksima kunfrato « Japana Esperantisto » al ni alportis tre esperigajn sciigojn pri la irado de Esperanto en Japanujo. Jam pli ol 700 anoj estas enskribitaj en la « Japana Asocio », kio pruvas ke pluraj miloj da ili ekzistas nun en la lando.

La tre interesa gazeto, direktata de la konsilantoj de « Japana Asocio », kiu jam pliampleksiĝis, enhavos, post Aprilo, 24 paĝojn anstataŭ 12-16.

Tre leginda en tiu n° « Nia dankeco al Indio » de D^{ro} Pro^o J. Takakusu; ankaŭ atentinda la sciigo, ke S^{ro} T. Kato, Eks-Ministro de Fremda Departamento, ĉeestis la gradigan ceremonion de la Lernejo de la Lingvo Esperanto.

Cetere, ni jam ĝin diris, la tuta gazeto estas atentinda, kaj speciale uzinda por la propagando, kaj ni rekomendas ĝin al ĉiuj kluboj, kaj al la individuoj, kiuj povas aboni novan gazeton.

Por faciligi al ili la aferon, ni transdonos plezure la abonon.

En nian proksiman numeron, ni enpresos fotografajn de japanaj studentoj apud alilandaj studentoj.

LA DUA GERMANA KONGRESO ESPERANTA.

La monata legado de la bonega « Germana Esperantisto » montras kiel rimarkinde kreskas la esperantista movado en Germanujo, kiel — pli kaj pli — la germanlingva gazetaro iĝas simpatia aŭ almenaŭ atenta al la demando pri la internacia helpa lingvo, kaj pri Esperanto.

Malgraŭ tio — ĉar ĉiuj ne legas ĉiujn propagandajn gazetojn — multaj personoj kredas ankoraŭ ke, en Germanujo, Esperanto dormetas.

Jen eltraĵo el letero, kiu montras kiel ageme oni laboras en tiu lando.

Al la Redaktoro de « Tra la Mondo » Meudon,

Tre estimata Sinjoro,

De la 9^a ĝis la 12^a de Majo ĉi tiujare okazos en Dresden la dua Germana Esperantista Kongreso. La Dresdena grupo, kiu estas unu el la plej junaj, prenis sur sin la gravan kaj malfacilan taskon prepari kongreson por germanaj Esperantistoj.

Antaŭ nelonga tempo, la 30^{an} de Novembro 1906, la Societo « Esperanto » fondiĝis kaj intruis ĝis nun, en 10 kursoj, pli ol 500 personojn pri Esperanto.

Jen la programo de l' Kongreso, resume:

La 9^{an} de Majo, 11^h matene, okazos la oficiala malferma kunveno, en kiu parolos pri Esperanto Sinjoro sekreta konsilisto D^{ro} Ostwald, Profesoro en la universitato de Leipzig.

Posttagmeze ŝipveturado sur Elbo al la historia urbo Meissen, en kiu la tiea Esperantistaro akceptos la kongresanojn. Vendredon kaj sabaton estos la laboraj kunsidoj.

Vendredon vespere okazos granda muzika reprezentado por plezuro.

Dimanĉon, granda ekskurso tra la Saksa Svisujo.

Dum la kongreso okazos granda Esperanta Ekspozicio en kiu la tuta esperanta literaturo estos reprezentata.

Multaj firmoj sendis katalogojn esperantigitajn kaj petis nin pri permeso elmontri siajn diversajn objektojn rilatajn al Esperanto.

Multaj fabrikdirektoroj ordonis ke liaj laboristoj lernu Esperanton.

Centojn da leteroj ni ricevas semajne kaj ni devas aranĝi novajn kursojn.

En mallonga tempo fondiĝis 8 novaj grupoj en Saksujo kaj ĉiuj volas sendi almenaŭ 4 - 5 delegitojn al la Kongreso.

Per tio ĉi mi ne volis skribi raporton pri la agado de nia grupo, sed nur volis montri la esperantemegan movadon en



KELKAJ KONSILANTOJ DE JAPANA ESPERANTISTA ASOCIO.

S^{ro} J. Iida D^{ro} K. Kroita S^{ro} Ĉif
S^{ro} T. Abiko D^{ro} E. Asada S^{ro} K. Sakai

Sakstujo, ĉar multaj Esperantistoj, nome negermanaj, kredas ke en Germanujo Esperanto progresadas nur malrapide.

Tiu ĉi tute ne estas vere.....

(El letero de S^{ro} Sergius Winkelmann, Dresden).

Tiu ĉi letero estas atentinda pri la komerca rilato. Ĝi montras ke, en Germanujo kiel en Anglujo, oni precipe konsideras la aferon je la praktika vidpunkto. La legadoj de la tiulandaj propagandaj gazetoj ĝin pruvas ankoraŭ plu; kaj, laŭ ni, la grupaj bibliotekoj devus ĉiuj posedi la ĉefajn naciajn tiuspecajn organojn.

Doni ilin por legi al la samgrupanoj estas unu el la plej efikaj propagandoj fareblaj kaj farindaj.

BIBLIOGRAFIO.

Tradukoj en Esperanton:

Ĉielo kaj Tero, mistero de Lord Byron, tr. de D^{ro} Noel, el Nancy.

Krom la intereso de la originalo kaj la lerteco de l' tradukinto, fama pro liaj antaŭaj verkoj, « Ĉielo kaj Tero » estas ankaŭ atentinda pri la prozodia vidpunkto. D^{ro} Noel uzis diversajn ritmojn zorge montritajn per signoj komence de la strofoj, dank'al kiuj ĉiu povas trovi la mezuron de l' versa muziko, kaj ĝin ĝui eĉ sen speciala prozodia kono.

La traduko estas dediĉita al malnova kaj fervora amiko de Esperanto, Inĝeniero Frécot. Ĝi estas belele eldonita (1 fr 25, ĉe S^{ro} Buvignier, libraro, Nancy, Francujo).

Hungara Poemaro, de niaj kunlaborantoj A. de Marich, A. Altenburger, kaj de D^{ro} R. Fiedler. (Ĉe Nagy Sándor Könyvnyomdájából, IV, Papnövelde-Uteza 8).

Sinjoro Badin, laŭ la ironiisto Georges Courteline, de S^{ro} René Peck kaj Raymond Jean. La tradukintoj celis ridigi la esperantistojn kaj trafis bone la celtabulon! (1 ekz., 25c; 25 ekz., 5 fr.; 50 ekz., 9 fr.; 100 ekz., 16 fr. ĉe S^{ro} René Beck, 7 R. de la Serpe Tours).

Al la virinoj, de Urbain Gohier kaj Fi-Blan-Go. (10 c. ĉe « Internacia Socia Revuo »).

Elektilaj Fabeloj de Fratoj Grimm, tr. de D^{ro} Kabe (1 M. 50, ĉe la eldonistoj de « Germana Esperantisto »). Ni reparolos pri tia verko, speciale atentinda pro la valoro de la originalo kaj la talento de l' tradukisto.

Sekvo sur la Kovorilo.

Ĉirkaŭ la Tria Kongreso.

Oni legis en nia lasta numero, ke, dum la TRIA, okazos ekspozicio pri la britaj sportoj. Oni scias ke la boatsporto estas tre ŝatata en Britujo kaj ke ĝi estas okazo por famaj ĉiujaraj konkuroj, ĉu inter la studentoj de la kolegioj en Cambridge, ĉu inter ili kaj tiuj de Oxford (Oksfor).

Ni esperas interesi niajn legantojn, enpresante artikolon pri tiuj boatkuradoj, speciale verkitan por ili de nia distingita samideano, Pastro J. C. Rust.

Pri la kongreso mem, ni enpresis sur la 7^{an} kovrilan paĝon praktikajn sciigojn speciale atentindajn. Oni rimarku la malkarcon de la bileto.


T. I. M.

Boatkuradoj ĉe Cambridge.

La rivero Cam, kiu fluas tra la urbo Cambridge, estas tie tre mallarĝa, ne havante pli ol 16-20 metrojn da larĝeco.

Ĉirkaŭe 3 kilometroj malsupre de la urbo, la rivero fariĝas iom pli larĝa, estas 20-26 metrojn. Kiel, oni demandas, estas eble aranĝi boatkuradojn sur tiu rivero? Ni penos klarigi tion.

La boatoj estas longaj kaj malpezaj, havante 18,29 metrojn de longeco, kaj nenie pli ol 70 centimetrojn de larĝeco. En ĉiu boato sidas 8 remistoj, po 4 ĉiuflanke, kun remiloj de 3,04 metroj, kaj direktanto, kiu tenas la ŝpuretojn de la direktilo kaj krias komandojn al la remantoj. Ĉiu boato apartenas al unu el la 17 kolegioj, kaj la boatoj portas pajlajn ĉapelojn kun rubandoj de la koloroj difinitaj por ilia kolegio. Multaj kolegioj havas du boatojn, kelkaj tri: tiel ke estas 40 konkursantaj boatoj, kiuj faras kuron dudekope. Antaŭ la tempo de la kuro, la 20 boatoj okupas lokojn en la rivero en longa vico, kaj la spaco inter ĉiu boato kaj la sekvanta estas 37 metroj. Ĉe la sono de pistolo, ĉiuj ekiras samtempe. La celo de ĉiu boato estas tuŝi ian parton de la antaŭa boato. Se tio okazas, la du boatoj interŝanĝas siajn lokojn la sekvantan tagon. Tiamaniere, tagon post tago, la ordo de la 20 boatoj povas ŝanĝiĝi. La kuradoj daŭras 8 tagojn, kaj la boatoj okupas la venontan jaron, komence, la lokojn en kiu ili sin trovas post la lasta kurado de tiu ĉi jaro. La tuta longo de la kurejo estas 2,80 kilometroj. La boatoj kuras dudekope; sekve la lasta de la unua sekcio estas ankaŭ la unua boato de la dua sekcio. Dum la kuradoj, estas tre granda amaso da rigardantoj sur



BOATKURADO ĈE CAMBRIDGE.

la riverbordo. Sur unu bordo, oni trovas la studentojn kiuj kuras laŭlonge de la borda vojo kun la boato apartenanta al ilia kolegio, portante la proprajn kolorojn, kaj plenigante la aeron je krioj de instigado. Sur la alia bordo oni povas vidi amason da patrioj, fratinoj, kuzinoj, kaj amikinoj, — kompreneble kun akompanantaj sinjoroj, — kiuj interesas sin pri la sukceso de tiu boato, kiu enhavas iun amatan aŭ almenaŭ konatan. La kuradoj havas lokon la unuan semajnon de Junio inter 4,30 kaj 6,30 vespere: kaj, se la vetero estas favora, oni ne facile trovos ie pli belan kaj ĉarman vidaĵon.

J. C. Rust.

Por la Kongreso de la Blinduloj. Tria Nomaro.

Anonimo	50 fr.
Grupo de Le Creusot	10 fr.
Sume	60 fr.
Jam ricevitaj	31 fr.
Kune	91 fr.

Korajn dankojn al la malavaraĵaj donacintoj. La plej malgrandaj sumoj ankaŭ estos danke akceptataj. Ni renovigas nian alvokon al la grupoj: ili bonvolu atentigi pri tio, ke la sukceso de la kongreso por blinduloj estos granda helpo por ilia estonta propagando. Do, helpante tiun kongreson, ili laboros por si mem.

Ni ĵus scias ke la grupo en Orléans intencas fari kolekton por la blinduloj dum la solena fermo de siaj kursoj. Brave por tiu bonega ideo.

A. M.

DIVERSAĴOJ.

Ministra letero.

Per letero de la 21^a de Marto, la franca ministro de l' komerco, Industrio, Poŝtoj kaj Telegrafoj sciigis nin ke « Tra la Mondo » estas enigita en konsenton subskribitan de Francujo kaj ok aliaj landoj pri la poŝtaj abonoj al la gazetoj.

Do, de nun, oni povas aboni *senpere* « Tra la Mondo » en ĉiuj poŝticejoj de la jenaj landoj:

Belga, Dana, Franca, Holanda, Itala, Norvega, Portugal, Sveda, Sviza.

Tiu fakto alportos al multe da niaj amikoj pli grandan facilcon por aboni « Tra la Mondo »; plue, ĝi montras ke la graveco de la gazeto konstante kreskas. Ĝi, do, estas double ĝojiga.

Je tiu duobla vidpunkto, ni estos dankaj al niaj kunfratoj, kiuj bonvolos diskonigi tiun sciigon.

Internacia muzika konkurso.

La 19^{an} kaj 20^{an} de Majo okazos ĉe la arenoj en Béziers muzika konkurso, kiu nepre pligrandigos la artan famon de nia urbo, ĉar aliĝoj alvenas ĉiuflanke: *Estudiantinas* duseksaj: Svisaj, Italaj, Alĝeriaj, k. c. estas enskribitaj.

Nia Beziersa Meceno, S^o de Beauxhortes, ĵus vizitis la ministrinon de la eksterlandaj aferoj, kaj laŭ lia tre afabla akcepto, oni rajtas konjekti, ke la angla registaro permesos, ke unu el ĝiaj plej bonaj muzikaj societoj venu partopreni en nia konkurso.

Tiu ĉi artoplena elmontriĝo tre certe altiros vizitantojn grandnombre en nian urbon tiel festeman kiel gastaman.

La 19^{an}, je la 9^a vespere, en la samaj arenoj lumigitaj per cent elektraj lampoj, okazos bovovira batakurado.

JOHANINO FLOURENS.

Grennutrita ŝercisto.

Estas ne sole la Amerikano de l' urboj aŭ de la vigla Okcidento aŭ de l' societama « Pullman » fumejo-vagono, kiu estas rakontisto naskita. La loĝanto en la izolita valo de l' Sudaj montoj, kiu ne konas la kriegon de la lokomotivo, kaj kies sentado de l' mondo limiĝas per la ruĝ-argilaj vojoj en lia hejmlando, ŝatas tiel bone sian ŝerceton, kiel la plej bona « farceur » el ili ĉiuj.

Du sinjoroj vojaĝis en unu el la montetaj graflandoj de Kentucky, antaŭ ne longe, esplorante por piĉpinarboj. Ili estis veturantaj de du horoj ne renkontinte ian homon, kiam ili ekvidis kajuton en senarbiĝaĵo. Estis tre silente. La porkoj kuŝis tie, kie ili estis falintaj; ia maldika argilkolora mulo sin paŝtis ĉirkaŭen kaj ĉirkaŭen laŭ klara rondo, por eviti la sinĝenon promeni, kaj unu malgrasa maldikema viro, kies vestoj estis samkoloraj kiel la mulo, sinapogiĝis sur arbo kaj lasis preteruligi la tempon.

« Miras ĉu li povas paroli, » diris unu vojaĝanto al la alia. Ambaŭ proksimiĝis al la viro, kies dubesflavaj okuloj ilin rigardis ŝajne sen sciivoleco.

« Kiel vi fartas? » diris la Nordulo.

« Kiel vi? » rimarkis la Sudulo, malfortike.

« Plaĉa lando. »

« Por ŝatantoj. »

« Loĝas ĉi tie la tutan vivon? »

La Sudulo pensema kraĉis sur la polvon. « N'ankoraŭ », li diris.

Elliraĵo el « LE READER ».

ILUSTRITAJ ESPERANTISTAJ POŝTKARTOJ. — Dek malsimilaj vidaĵoj de la famaj fabrikejoj SCHNEIDER (Le Creusot) kun klarigoj Esperante. La serio (10 kartoĵoj), afr.: fr. 1.05. Sendi la mendojn al:

Esperantista konsulejo. Le Creusot. Francujo.

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.



EN LA GAZETARO.

Internacia ekspozicio de Gazetoj: Ĝi okazos dum la monatoj Maja & Junia en Kopenhago. Nia sindona dana kunbatalantino, Fino Gunvar Mönster, anino de la «Lingva Komitato» afable prenis sur sin la partoprenadon de kelkaj Esperantaj gazetoj en la ekspozicio, kio estos bonega propagando por Esperanto. «Tra la Mondo» havos lokon en la fako: «Filantropio kaj Socialaj problemoj».

Ni citu 4 bonajn artikolojn montrantajn kiel, ĉiulande, Esperanto estas preparolata en la gazeta ro *The Ohio Sun* (27/1/07) kun ilustraĵoj (U. S. DE A.) — *The Herald* (15/12/06) (AŬSTRALIO). — *Le Petit Courrier de MADAGASCAR*. — *Correio da Manha* (7/3/07), tre favora organo en BRAZILUJO. Ĝi estas tre grava ĉiutaga ĵurnalo en Rio de Janeiro.

La eldonejo de la monata revuo «Kosmos» en Stuttgart intencas helpi la propagandon de nia lingvo per, kiel eble, ĉiufoja enpresigo de Esperante verkita artikoleto, klariganta ian ilustraĵon. Ĝi tial petas la Esperantistojn, precipe ekstereŭropanajn, ke ili bonvolu sendi ian ilustraĵon, bildkarton aŭ similan, kiu interesos Germanojn aŭ eĉ Eŭropanojn kaj ke ili aldonu priskriban artikoleton. La firmo donos interŝanĝe interesan Esperantan libreton el sia eldonejo. Oni sendu en letero, por ke la ilustraĵo ne difektigu antaŭ la klišigo, al: «Kosmos» Franckh'scher Verlag, Stuttgart, Germanujo.

L' U. S. F. S. A.

Tiu ĉi serio da literoj, kiun oni devas elparoli tiel ke ĝi estas skribita, estas la nomo per kiu oni montras en la sportistaro l' Unuiĝantaro'n de la Societoj Francaj de Sportoj Atletaj.

L' U. S. F. S. A. enhavas nune pli ol 1000 asociojn sportajn, kiuj posedas pli ol 100.000 junajn Athletojn. Ĝia celo estas krei ligilon inter la diversaj societoj sportaj de Francujo, organizi ĉampionadojn multajn kaj diversajn kaj precipe krestigi inter la junularo de la lernejoj la guston al la korpaj ekzercoj. La Kampejo de l' Unuiĝantaro estas preskaŭ senlima. Ĝi regas super la tuta nemetiista sporto en Francujo: piedkurado, futbalo, remado, laŭteniso, ciklismo, kroketo, kriketo, skermo, naĝado, hokejo. L' U. S. F. S. A. organizas ĉiujare tre gravan kvanton da konkursoj: ĉampionadoj de Francujo, ĉampionadoj regionaj kaj inter lernantoj, en ĉiuj sportoj praktikaj. La gimnazianoj, montritaj por iri Parizon okaze de tiuj konkursoj ricevas de l' Unuiĝantaro helponon por vojaĝo.

L' U. S. F. S. A. estas direktata de komitato konsistanta el Sinjoroj Duvigneau de Lanneau prezidanto; Pierre Roy, sekretario ĝenerala k. t. p.

Neniu povas aniĝi al societo filia de l' Unuiĝantaro se li ne estas nemetiisto, laŭ la difino kiu estas je la unua vico de la Regularo.

«Estas nemetiisto ĉiu persono kiu neniam partoprenis en ia kuro publika, en konkurso aŭ en kunveno malfermita por ĉiuj, nek disputis por premio mona — aŭ por mono devenanta de la akceptoj sur la ejo — au kun metiistoj, aŭ kiu neniam estis, ĉe iu ajn periodo de sia vivado, profesoro aŭ helpa profesoro metiista de korpaj ekzercoj.»

Tamen la ano de l' U. S. F. S. A. povas enspezi monajn premiojn kaj partopreni en kunvenoj publikaj en ĉio kiu rilatas la pafado al celtabulo, la pafado al kolomboj vivantaj kaj artaj kaj aŭtomobilismo.

Oni do povas vidi ke per sia universaleco kaj la grava rolo, kiun ĝi ludas meze de la junularo franca, L' U. S. F. S. A. povas estis fiera je sia devizo glora:

«Ludus pro Patria».

La organo oficiala de l' U. S. F. S. A., ĉiusemajne aperanta, estas la gazeto **Tous les Sports** (Ĉiuj Sportoj). Ĝia simpatia Direktoro Sr Raoul FABENS, la sportisto bone konata, komprenante la utilecon de nia kara lingvo, profitis antaŭ tri monatoj la pligrandigon de sia gazeto por malfermi kronikon en Esperanto. Jen bonega laboro pri kiu ni ne povas tro gratuli lin.

Multaj sportistoj ĉiulandaj kunlaboradas en ĝi, kaj ĉiuj novaj kunlaboradoj estos kun plezuro akceptataj (sin turni al Tra la Mondo).

Tiel, fiere portante la verdan standardon inter la sportistoj, ni iru la vojon celitan kaj ni estas certaj ke laŭ la diroj de nia amata Majstro, Doktoro Zamenhof,

«Ni paŝo post paŝo, post longa laboro atingos la celon en gloro.»

L. DE GUESNET.

Nekomerca anonceto: 36, Angla familio enhavanta kvin personojn volas resti en Ostendo aŭ ĝia ĉirkaŭaĵo dum du aŭ tri semajnoj, dum Aŭgŭsto la plej proksima, kaj deziras *Esperantan* loĝejon. Skribu al Sr° Sexton, Fairfield West, Kingston-on-Thames, England.

Mallonga korespondado: Sr° Levis B. Lüders (U. S. DE A.) — Koran dankon pro via afabla poŝtkarto.

LIBRAIRIE

DE

L'ESPERANTO

46, rue Sainte Anne, Paris.

La Katalogoj

estas riceveblaj senpage.

ESPERANTISTOJ

PASIGU LA SOMERON

EN

Aix=les=Bains


(FRANCLANDO)

Sendu 30 centimojn al la **LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO** kaj vi ricevos afranke la interesan broŝuron de Dr° J. DARDEL, pri la termala kuracado en tiu urbo.

ASP

KANDELLANTERNOJ

por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza, Oportuna, Pura, Neestingebla en Ventego, Funkeiadas bonege nur kiam oni uzas la por ĝi

Konstruitajn ASP-Kandelojn 120.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn, kun lenso 5 kronojn, 18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn.

SENDOTA ĈIEN DE


O. F. ASP, Kopenhague. DANUJO.

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

General Agento:

Sr° G. RUTTER, 30, Red Lion Squar, LONDON.



LA PLUS LOGIQUE des Méthodes appliquée à LA PLUS SIMPLE des langues suivant LES PLUS MODERNES des principes d'enseignement des langues.

Méthode Palmer

Livre de 100 pages: fr. 1.25.

Franco: Belgique, fr. 1.35.— Etranger, fr. 1.50.

VERVIERS, Place Verte, 20.

MIKSAĴOJ.

POR LA PROPAGANDO.

Sinĵor'o «Paguella de Follenay» parol'as pri amuz'aj'o kiu'n kardinal'o Guibert ŝat'is rakonti kaj kiu rid'ig'is li'n ankoraŭ tut'kor'e dum lia maljun'ec'o. Je la temp'o dum tiu ĉi est'is misi'ist'o, iam jun'a paŝt'ist'o ven'is al «Digne» kaj pet'is por vid'i la episkop'on. Li vol'is est'i konfirm'at'a. Monsinĵor'o «Miollis» est'is ĉe tabl'o kun si'a'j vikari'o'j ĉef'a'j; tuj li en'ir'ig'is la naiv'a'n mont'an'o'n.

— Vi vol'as ricev'i konfirm'o'n, et'ul'o? Nu kio'n vi sci'as.

— Mi sci'as «Pater» kaj «Ave»

— Nu! ĉu vi ne sci'as ali'o'n?

Proponu tiun tekston por traduki al personoj kapablaj interesiĝi je Esperanto, donante samtempe la gepatralingvan «Ślosilon» de Ĉefeĉ.

— Mi sci'as fajf'i.

— Fajf'u do, iom'et'e

La infan'o lok'ig'as du fingr'o'j'n en la buŝ'o'n kaj fajf'as kun la moder'ec'o kiun bon'a eduk'it'ec'o al li ordon'as antaŭ tiel sankt'a'j person'o'j.

— Kiel! Ĉu vi ne fajf'as pli akr'e en mont'ar'o?

— Ha! jes ja! En mont'o'j, mi fajf'as pli akr'e ĉar la brut'o'j estas mal'proksim'e, sed tie ĉe ili est'as tut'e proksim'e.

Tiu naiv'ec'o ĝoj'ig'is la mal'jun'a'n kardinal'o'n. (Eltiraĵo de religia almanako).

Tradukis 7068.

REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1^o Ĉiuj problemoj proponataj kaj solvoj, amuzaj, devas esti sendataj al sinĵoro Ch. Brunet 9, cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la tuta paĝo «Miksaĵoj». La personoj kiuj subskribas per pseŭdonimoj (supozitaj nomoj) devas ĉiam aldoni sian veran nomon.

2^o Krom esceptoj speciale dirotaj la solvoj devas esti senditaj al S^{ro} Brunet antaŭ la dato montrita post la problemoj.

3^o Divenintoj estas ordigataj, kvaronjare, laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estas donacataj al la plej sagacaj.

4^o Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝas specialajn premiojn.

Oni adresu la solvojn NUR POŝTKARTE al Sinĵoro Ch. Brunet, 9, cours Victor Hugo, Bordeaux.

Neniam sendi karton surhavantan kune solvojn kaj proponatajn problemojn.

4^a kvaronjaro (2^a jaro).

PROBLEMO 24^a (de A. Baissac).

Mia unua estas pronomo; fari donacon mia dua signifas; iam mia tria kaŭzis malfeliĉon; mia tuto estas frukto

PROBLEMO 25^a (de la sama)

Mi estas homa korpa parto; ŝanĝu okfoje mian kapon kaj vi trovos:

- titolon de nobeleco — ovblankon
- frandaĵon — maran kreskajon
- fruktalfluidaĵon — tolaĵon
- bezoni grati — metalan ringon.

Problemo 26^a (DE MI).

• • • • •

• • • • •

• • • • •

BSSRROOOOTTZZJPELUAJVI

Vertikale: libro tre ŝatata kaj konata de Esperantistoj; horizontale: du esperantistoj same ŝatataj kaj konataj de la Esperantistaro.

Problemo 27^a (DE LA SAMA).

• • • • •
• • • • •
• • • • •
• • • • •
• • • • •

- besto
- estaĵo
- ekstremaĵo
- neniam vira
- kapo de najtingalo

Problemo 28^a.



El Lusthof

Kie estas la brutgardistino?

Rimarko: Por tiu ĉi problemo sendi nur montraĵon. Tiamaniere oni ne difektos la ĵurnalon.

Problemo 29^a (DE L' AMIKO).

Ofte en la mano. Ŝanĝu la ventron, mi pikas. Unua kaj dua kion mi volus ke vi pagu al mi.

Rimarko: La solvoj de tiuj problemoj estos akceptataj ĝis la unua de Julio 1907^a.

Homo rigardadas valizon en bazaro. La vendisto diras al li:

- Ĉu vi volas ĝin?
- Por kio, diras la homo.
- Por enmeti viajn vestojn, tolaĵon, k. t. p.
- Kaj mi restus nuda.

10072.

Sinĵoro kiu celas ricevi la ordenon pro bonfardo diras ke li savis la vivon de multaj personoj.

Kiel? oni lin demandis

Tre simple, diris li, mi estas kuracisto de mia dudekjaro, nun mi estas sesdekjara kaj neniam mi ekzercis mian profesion.

10072.

Sesjara knabineto vangfrapis sian fratineton

- Kial vi tion faris? al ŝi oni diris
- Mi ludas, kvazaŭ mi estus la patrineto, ŝi respondis.

10072.

Internacia Sciencia Revuo

Oficiala Monata Organo de la
Internacia Sciencia Oficejo Esperantista
Genevo-Svislando.

Kelkaj originalaj artikoloj en la venontaj numeroj:

Al nia Legantaro, antaŭparolo de la nova redakcia komitato, pri la fondiĝo de *Sciencia Asocio Esperantista* dum la dua universala Kongreso, la kreo de *Internacia Sciencia Oficejo* en Genevo kaj la reorganizado de *Internacia Sciencia Revuo*.

Pri surfacoj duaordaj komunfokusaj, de R. Bricard, Parizo (Francujo).
Du vortoj pri terminoj matematikaj kaj aritmetikaj, de W. Šmurlo-Stuttgart (Germanujo).

Pri la uzebleco de la fortoj de l' homo, de André Broca, Parizo (Francujo).

Deveno de la speco ĉe la papilioj, de P. A. H. Muschamp (Anglujo).

Artikoloj pri geodezio, de V. Šulgin, Pskov (Rusujo).

Pri la manko de internacia geofizika terminaro, de E. Chaix, Genevo (Svisujo).

La komplikeco pri la deveno de la tertremoj, de Th. Tommasina, Novara (Italujo).

Evolucio de la religia ideo, de Dr^o Vallienne, Parizo (Francujo).

Pri la hidrodinamika teorio de la « Seĉoj » de Prof. Chrystal, Edinburgh, Skotlando.

Nuna Stato de Internacia Bibliografio, de J. Hanauer, Frankfurt a/M. (Germanujo).

Specimeno senpage laŭ peto.

Jare, 7 frankoj, 6 markoj, 6 ŝilingoj aŭ 2,75 rubloj.
Unu numero: 60 centimoj, 50 pfenigoj, 6 pencej aŭ 25 Kopekoj.

Oni abonas ĉe la Sciencia Oficejo, 8, rue Boyv-Lysberg, Genevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Review of Reviews* », Londono (Anglujo), *Raffaello Gusti*, Livorno, (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Rusujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).

LA TRIA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

KEMBRIGŬO, AŬGUSTO 10-17, 1907.

Mi petas ke *La Trio* por la *Tria* enskribos la
apude skribitajn nomojn sur la nomaron de la
papermonon
Kongresanoj. Mi kunsendas *poŝtmandaton* laŭe.
poŝtmarkojn

(Kongresa Bileto kostas 10 ŝ. 10 f. 10 m. 5 r. 10 kr, 5 fl. 2 1/2 dol. k. t. p.)

Pri la loĝado.

1) Mi deziras aĉeti biletaron (kosto 45 fr.) por septaga dormoĉambro kun salono kaj frua matenmanĝo en domo rekomendita de *La Trio*, kvin tagmanĝoj kaj kvin vespermanĝoj en la Corn Exchange.

Aŭ 2) Mi deziras lui dormoĉambrojn por personoj en *hotelo*, por kiuj mi estas preta pagi frankojn ĉiunokte.

Aŭ 3) Mi deziras lui dormoĉambrojn por personoj kaj salonon en loĝeja domo rekomendita de *La Trio*, por kiuj mi estas preta pagi fr. por la semajno, aŭ fr. ĉiutage.

Mi prenas tiun ĉi okazon por mendi ankaŭ la sekvantajn el la *eldonaĵoj de la Kongreso*:

Ekzempleroj de Kongresa Ilustrita Poŝtkarto. (65 c. la doz.)

..... Muzikaj Poŝtkarto. (50 c. la dozo.)

..... Alglueblaj etiketoj. (1 fr. por 50.)

..... la ludota Komedio Boks kaj Koks. (70 c.)

..... el *Pickwick* (Dickens). (70 c.)

..... Paper-flagetoj Esperantaj. (70 c. por 10.)

Por helpi vian organizan penadon, mi havas plezuron sciigi al vi ke:

Mi parolas la lingvojn

Mi estas membro de la specialistaj societoj pri

kaj deziras partopreni je iliaj kunvenoj dum la Kongreso.
Mi restos en Kembrigŭo de Aŭgusto ĝis kaj esperas partopreni je la aranĝoj, kiujn efektigos la Londonaj samideanoj post la Kongreso.

Mia profesio (*se instruisto, bonvolu aldoni vian specialan fakon*), metio, okupado kaj titoloj estas kaj mi estos kontenta renkonti samprofesianojn aŭ samtitolulojn dum mia restado en Kembrigŭo.

Mi petas, ke vi bonvolu sendi al mi, tuj kiam definitive aranĝita, liston de la proponitaj ekskursoj dum kaj post la Kongreso, por ke mi faru mian elekton inter ili, kaj ankaŭ ke vi sendu kun mia Kongresa Bileto — kiam preta — ateston pri membriĝo, kiu rajtigos min ricevi fervojan rabaton.

Mi estas, Sinjoroj, via Samidean(in)o,

Nomo:

Konstanta Adreso:

..... (Dato.)

Al

KONGRESO 2, Kings Parade, CAMBRIDGE.

La Konstanta Komitato de la Kongresoj petas la Esperantistojn kaj la societojn kaj grupojn, kiuj havas proponojn por fari, rilate al la temoj studotaj de la Tria Kongreso, ke ili volu skribi ilin al la Prezidanto de la Konstanta Komitato: Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris.

La dudeka Jubileo de Esperanto.

Ni ne povas, hodiaŭ, longe paroli pri tiu temo; ni nur citos la jenan eltiraĵon de letero de Sr^o Vl. Tabinski, kiu, reirante hejmen, vizitis Dr^{on} Zamenhof en Varsovio:

« Hieraŭ mi vidis Dr^{on} Zamenhof kaj interparolis kun li koncerne la feston jubilean. Li trovas la ideon bonegan... Li kredas ke la esperantistoj havos baldaŭ sian feston ĉiujaran, kaj la prova festo helpos multe por la efektiviĝo de la ideo. »

Post tiaj paroloj de Dr^o Zamenhof, estas senutile insisti por ke multaj grupoj havu feston la 21^{an} de Julio 1907.

A. M.

En la Armeo.

Rezultas de klopodoj faritaj de unu el niaj militaj amikoj, ke la franca milita ministro, kvankam persone simpatia por ĝi, ne volas fari por Esperanto paŝon decidan kaj vere efikan, opinante ke la lingvo ne havas — almenaŭ nun — sufiĉan gravecon por la militistoj.

Estas do necese ke ĉiuj, kiuj interesas al Esperanto konsiderata je l' milita vidpunkto (ekz. Esperanto kaj Ruĝa Kruco), alcentrigu siajn penadojn kaj kolektu ĉiujn faktojn utile konigitajn je la ĝustatempa momento.

Por faciligi al ili la laboron, ni enpresos la nomojn de la militoj ĉiulandaj, kiujn oni konigos al ni kiel verajn esperantistojn kaj kiel speciale agemajn, tiamaniere ke ili povu interrilatiĝi.

Plue ni enpresos plezure *mallongajn* raportojn pri la esperantista movado en la armeoj diversaciaj.

Ni komencos, en nia proksima numero, per raporto de nia amiko J. Schroeder pri Esperanto en la Aŭstria armeo.

Komandanto L.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato.

LA PLEJ MALNOVA EL ĈIUJ ESPERANTISTAJ

GAZETOJ FONDITA EN 1895.

ADMINISTRACIO:

Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris.

JARA ABONO:

Sen Literatura Aldono 5 fr. »
Kun Aldono 7 fr. 50

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj

Jara abono: 2 fr. 50.

Administracio: Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

Ni akceptas nenian respondecon pro la nericevo de la gazetoj. Tiukaze, oni sin turnu senpere al la administracioj.

ESPERANTAJ ORGANAJ.

Eŝo Esperantista. — Praktika kaj komerca. Ĉe S^{ro} H. Brühl, Unter den Linden 47 III, Berlin, Deutschland. Jare, 2 markoj.

Eksport ĵurnalo. — Internacia Revuo por komerco, Industrio kaj Tekniko. — Jare 5 fr. (3 markoj Germanuje). — Ĉe Esperanto Verlags-Anstalt Emil Schnell, G. m. b. H. Frankfurt a. M. Germanujo.

Esperanta Ligilo. — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Brail-
le'a sistemo. 3 f. — Ĉe S^{ro} Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

Esperanto. Duonmonata Internacia Gazeto. Tutmonda informilo. Diversnaciaj eldonoj; ĉiulandaj korespondantoj. Praktikitaj informoj. Novaĵoj el la tuta mondo. Organo de la konsuloj kaj peresperantaj societoj. Aperas en ĵurnala formato. *La plej malkara! la plej ofta!* Jarabono: 3 frankoj. Unu numero: 10 centimoj. Direkcio: 8, rue Bovy-Lysberg, Genève, Svisujo. La unua numero aperis en Februaro. Oni nepre legu ĝin. Premioj al la legantoj.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu N^o afrankita 0f. 50; Francuje, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 frankoj. Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

Foto-Revuo Internacia. — Ĉiunmonata resumado de Photo-Revue. Jara abono, 5 fr. 1 Numero aparte, 50 cent. Ĉe la «Librairie photographique» Charles Mendel, 118 Rue d'Assas, Paris.

Idealo. — Organo de « Sicilia Federacio Esperanta ». Italuje, 2 fr. alilande, 3 fr. Corso Catalafimi, 495 Palermo (Italujo).

Juna Esperantisto. — Tute Esperante. Divastigo de Esperanto ĉe la ĵurnalo — 2 fr. 50. — Redakcio: 9, Avenue des Vollandes, Genève (Suisse); Adm. 33, Rue Lacépède, Paris.

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7.

Lingvo Internacia. — Monata Esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto. Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komenciĝo de ĉiu monato.

Socia Internacia Revuo. — Internacia redaktata pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e (France).

PROPAGANDAJ ORGANAJ.

The American Esperanto Journal. — Oficiala organo monata de la « American Association ». Angle kaj Esperante. Propagando kaj literaturo — Jare 5 fr. Boulevard station, Boston, Mass. (U. S. A.)

Amerika Esperantisto. — Gazeto por la Lingvo Esperanto en la Unuigitaj Statoj de Ameriko, angle kaj Esperante. Bele presata. Jara abono: 1 dolaro. Adreso: L'Amerika Esperantisto, Oklahama City, U. S. A.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteke del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. jare. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgiko). La abono komencas nepre la 1^{an} de Septembro.

The British Esperantist. — Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 20 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj da literaturo tute en Esperanto. Jare 4 fr. — Ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

Casopis Českých Esperantistů. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. — Adm. kaj Red.: Praha II — 313 — Karlovo náměstí.

Centrameriko Esperantista. — Hispane kaj Esperante. F. R. G. Abrell, 8^a Avenida Sur 11, Canton Libertad, Guatemala, Ameriko.

L'Esperantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francuje 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare; aparta N^o: 35 cent.

Esperanto. — Hungare kaj Esperante. Sciencia kaj literatura. 4 fr. ĉiulande. Ĉe S^{ro} Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

Germana Esperantisto. — Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiunmonate) Redaktata germane kaj Esperante. JARABONO, 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

Helpa Lingvo. — Dane kaj Esperante. Abono 1,20 kron. Admin. ĉe Finn G. Mönster, Osterbrogade 54 B, Kopenhago O., Danujo.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, — kun ilustraĵoj. Jarabono 2 fr. 60 — N^o 1^a, 3 Ĉome, Jurakō, Kozimacik, Tokio.

La Pioniro. — Ĵurnalo Esperanta India. Eldonata de la Kolar Gold Field Esperanto Club. Monata abono: kvar pencoj. Red. kaj Adm. Hon^a Sek^o de la klubo esperantista de la K. G. F. Marikuppam, Mysore State, South India.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 2 fr. Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

Ruslanda Esperantisto. — Ĉiunmonata organo de la S-to « Espero »; — Jara abono 8 fr.: Ruslando, St Peterburgo, B. Podjačeskaja, 24, al la S-to « Espero. »

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. Administracio kaj redakcio: Avellanar, 11, presejo — Valencia (Espana).

Svisa Esper. — France kaj Esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEMAL ORGANAJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

Le Cycliste. — Revuo monata de ciklotekniko kaj de turismo. — D^{ro}: P. de Vivie, 5, Rue de la Préfecture, Saint-Etienne. — Abono: Francuje 1 fr. 80, alilande 2 fr. 40. — Ĉiuj informoj pri la bicikloj kun meĥanismo por ŝanĝi la rapidumojn kaj pri higienaj ciklistoj.

De Luthof. — Ĉiunmonata multilustrata gazeto. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj.

Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Unversala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. **Petu specimenon.**

Il Cittadino Italiano. — Itala familia gazeto. Via della Posta, 16. Udine.

Nekomercaj anoncoj.

1 fr. 25 po 4 linioj 33-literaj. Ĉiu plua linio: 25 c.

34. **V. Reichelt**, Dresden, Sebnitzer st. 32 ŝanĝas ĉiulandajn leterojn.
35. Deziras korespondi poŝtkarte pri interŝanĝo de malnovaj Esperantaj ĵurnaloj, H. T. Bailey, 31, Caversham Road, Kentish Town, London, Anglujo.

Mallonga korespondado.

Fino **H. Hempel**; Sroj **Zacherl**, **Schröder**, **Daltro Santos**, **Ŝulgin**, **W. H. Meigh**. — Koran dankon por viaj interesaj sendaĵoj.

Tutmonda Esperantista Poŝtkalendaro por la jaro 1908. — Tiun kalendaro, pri kiu ni jam parolis, enhavas en praktika kaj oportuna formato kaj arango interesan materialon por Esperantistoj, diversajn sciigojn internaciajn, kiujn oni alie devas serĉi en multaj apartaj verkoj: tabelojn, adresojn k. t. p.

Certe, do, la tekstoj plene kontentigos ĉiujn Esperantistojn, kiuj volas ĉiam tuj sciigi pri kelkaj necesaj faktoj tuŝantaj la esperantan aferon aŭ havantaj signifon internacian en klara, priirigardebla maniero.

Ni insiste petas ĉiujn grupojn, klubojn, konsulejojn aŭ informejojn, sendi la precizajn adresojn al la redaktaro; samtempe la hoteloj kaj firmoj, kiuj uzas Esperanton parole au skribe, estas petataj sciigi ĝin pri tio.

(Vidu, samloke, nian antaŭan numeron).

S^{ro} **Rudolf Richter** (Bohemujo). — Vi ne diris ĉu la n^oj mankantaj apartenas al la 1^a aŭ 2^a jaro de « Tra la Mondo ». Sendante la monon, bonvolu precizigi la aferon.

Al niaj korespondantoj.

Bonvolu ĉiam, skribante al ni, aldoni legeble vian adreson, por ŝpari nian tempon.

Okaze, rememorigu la daton de la letero al kiu vi respondas.

Al niaj abonintoj.

Skribu legeble vian nomon kaj vian adreson. Jam kelkaj pers^onoj posedantaj kaŭĉukan stampilon, sendas 12 adresojn stampitajn por ĝi sur la banderolojn de la numeroj sendotaj. Ni rekomendas tiun procedon.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant. — A. J. WITTEYCK, Presisto, Bruĝo.